

La Rondo

The Australian Esperanto Monthly

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.
Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.
Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

Vol. 12, N-ro 70.

MELBURNO.

Jan. - Marto, 1956.

LA DEKA TUTAUSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO

BRILA KONGRESO EN LA FEDERACIA ĈEFURBO.

Canberra, nia bela federacia ĉefurbo, estis la loko de nia jubilea 10-a Tutaustralia Esperanto-Kongreso, kiu okazis inter la 2-a kaj 7-a de Januaro 1956.

La Canberra Esperanto-Klubo estas nur malgranda, sed ĝiaj membroj estas despli bonaj organizantoj. Ges-roj H. Torr kaj s-ro N. Gamble laboregis kiel sklavoj por glatigi ĉiujn malfacilaĵojn, sed ankaŭ s-ino Hall kaj s-ro S. Fulop meritas grandan laŭdon.

La kongreso okazis en 2 kabanjoj de la "Bon-Najbara Konsilantaro" en la "Riverside" Kultura Centro. Unu dometo funkciis kiel ejo por ekspozicio, filmvesperoj, prelegoj kaj ĝeneralaj kunvenoj, dum la alia estis uzita por amikaj vesperoj aŭ por servi refreŝaĵojn al la kongresanoj.

Aliĝis al la kongresoj 101 gesamdeanoj, el kiuj 74 fakte partoprenis. La loka Kongres-Komitato, la nelacigebla trio s-ano Harry Torr (Prezidanto), s-ino Joyce Torr (Kasistino) kaj s-ano Noel Gamble (Sekretario), ĉeestis ĉiujn kongresanojn aŭ ĉe la stacidomo aŭ ĉe la aerodromo kaj veturigis ilin en siaj automobiloj al la preskaŭ luksa "Hotel Kurrajong", kie, ĉirkaŭita de belaj arboj, arbustoj kaj verdaj razenoj, loĝas la plimulto de la kongresanoj. Tio estis bonega aranĝo, ĉar loĝante kaj manĝante kune, la kongresanoj farigis tre baldaŭ unu granda rondo familia. Hotelo Kurrajong estas registara hotelo,

kutime rezervata nur por la deputitoj de la federacia parlamento, sed, dum la somera ferio de la parlamento, ĝi estas ankaŭ frekventata de la ĝenerala publiko.

Propaganda laboro.

La propagando ĉe la gazetaro kaj la radio estis bonege preparita de s-ro Gamble. Jam antaŭe li "bombardis" la lokan gazeton "Canberra Times" kaj la lokajn radio-staciojn, do ne estis granda surprizo ke lia laboro estis kronikita per ĉiutaga detala raportado. Entute aperis 129 coloj pri la kongreso kune kun 2 grandaj fotografajoj. Sed s-ro Gamble ankaŭ ne forgesis la multajn en Canberra akredititajn ĵurnalistojn kiuj reprezentas gazetojn el aliaj aŭstraliaj urboj. Ilin s-ro Gamble provizis ĉiutage kun lerte ellaborita "gazetar-servo". Sekve de tio raportoj pri la kongreso aperis en preskaŭ ĉiu urbo de Aŭstralio kie aperas taggazetoj. Kvin raportistoj persone ĉeestis la solenan inaŭguron de la kongreso kaj persone intervjuis interŝtatajn vizitantojn.

Jam antaŭ la kongreso okazis 2 gravaj radio-intervjuoj pri la kongreso. En Sydney, nia nelacigebla propagandistino, s-ino Grace Barlow, estis intervjuata ĉe radio-stacio 2GB (de la reto Macquarie kun 21 radio-stacioj) kaj en Canberra mem la loka stacio intervjuis s-ron H. Torr, f-inon E. Bull kaj s-ron Herbert Koppel (Melbourne).

Efika ekspozicio ĉe "Riverside" montris al vizitantoj la universalecon de Esperanto kaj varbis novajn adeptojn. S-ro Fulop, nia loka libro-servanto, helpite de s-ino Glenie (Melbourne) havis standon kaj vendis eksterordinare grandan kvanton da libroj. (Unu s-ano el Sydney, s-ro Fritz Mueller-Sorau, aĉetis librojn en la valoro de £7.)

La Kongreso komenciĝas.

Por tiuj samideanoj kiuj jam alvenis antaŭ la kongreso estis organizita (eksterprograme) Nov-Jara Festo kun deklamoj, kantoj, ludoj kaj bongea manĝeto pro kiu ni ŝuldas grandan dankon al s-ino E. Hall.

Post kunveno de komitatanoj de ĉiuj Esperanto-klubo de Aŭstralio, komenciĝis la kongreso je la 2./1. per protestanta Di-Servo, kiun gvidis digne D-ro Fred Williams (Melbourne). F-ino E. Styles kaj s-ino Fay Koppel (Melbourne) legis la lecionojn el la Nova Testamento, s-ino Joyce Torr (Canberra) kantis kaj s-ino E. Hall pianludis. Post la servo oni kolektis monon por la Internacia Ligo de Blindaj Esperantistoj: entute £6 kolektiĝis. La "Bonveniga Manĝo" en la luksa "Hotel Civic" sekvis la saman vesperon. Inter la honoraj gastoj oni vidis s-ron G. Whiteford, iama UEA delegito de Melbourne, nun emeritita ŝtaticisto en Canberra, kaj s-ron Krippner de la "Bon-Najbara Konsilantaro". Post luksa manĝo okazis la oficiala parto de la vespero. S-ro Torr bonvenigis la honorajn gastojn kaj petis s-ron Whiteford preni la parolon. Tiu ĉi malnova samideano rakontis pri la unuaj tagoj de Canberra kaj pri la uzo de Esperanto okaze de la internacia konkurso por la konstruo de la ĉefurbo, sekve de kiu franca samideano arkitekto Agache gajnis la trian premion. Post la oficiala parto okazis diskute pri la temo "Kiamaniere progresigi Esperanton", en kiu partoprenis s-anoj el Sydney, Canberra kaj Melbourne.

Malfermo de la Kongreso.

La "Solena Malfermo" okazis marde la 3-an de Januaro. Honora gasto estis s-ro F. D. Quinane, estro de la loka "Advisory Council". S-ro H. Torr kiel kongres-prezidanto bonvenigis s-ron Quinane al la kongreso. Tiu dankis la E-istojn ke ili elektis Canberra kiel kongreslokon kaj rakontis pri la historio de la ĉefurbo.

S-ro Ken Linton dankis kiel A.E.A. Prezidanto s-ron Quinane pro liaj bonvenigaj vortoj kaj akcentis ke Canberra estas la ĝusta loko por Esperantista kunveno; ĉar ne nur estis Esperantisto kiu gajnis la 3-an premion en la internacia konkurso por la konstruo de Canberra, sed ĉe la gajnto mem, s-ro Walter Burley Griffin, arkitekto el Chicago, lernis Esperanton ĉe la Melburna E-Klubo. Tion certigis s-ino R. B. Bigelow (Sydney), kiu instruis s-ron Griffin, kaj s-ro M. Cohen (Melbourne), kiu enkasigis siatempe la membrototon de s-ro Griffin. Nome de A.E.A., s-ro Linton dankis al s-ino Joyce Torr pro sia granda laboro organizi la kongreson, precipe dum la tempo kiam la sekretario, s-ro Gamble, estis for en Eŭropo. Kiel malgranda danko li transdonis al ŝi la luksan eldonan de "Fundamento Krestomatia" kaj belan kristalan ujon.

Germana enmigrinto Wolo Guelling salutis en la nomo de D-ro Herrmann, Prez. de Germana E-Asocio. Inter multaj aliaj salutoj ni menciis nur mallonge leterojn de f-ino O. Stremple (Prezidantino de la lasta Kongreso), de s-ro J. Hawks (Perth), s-ro S. L. Parry (Brisbane), s-ro Vajdlich (Zagreb), Esperanto Mission (Svedujo) k.a.

S-ro W. J. Drummond, kiu estis honore enskribita en la listo de kongresanoj pro la fakto ke li partoprenis la unuan aŭstralian E-Kongreson en Adelaide (1911), sendis salutojn per magnetofona sonbendo. Same faris s-ro S. L. Parry, Prez. de la Brisbana E-Societo, kiu speciale dankis pro farita laboro al s-ro F. R. Banham, redaktoro de la asocia organo, kaj al s-ro Herbert Koppel, landa sekretario.

La leter-konkurso estis nova ideo ĉe niaj kongresoj; eble pro tio nur 8 personoj ensendis kontribuojn. La komisiono kiu devis prijuĝi la kontribuojn konsistis el s-ro Linton, f-ino Barlow kaj f-ino Bull, kaj ili unuanime decidis ke la unua premio de £5 estu donata al f-ino Edna Dash (Sydney). Dua plej bona kontribuajo venis de s-ino Joyce Torr (Canberra) kaj tria de J. Docksey, kampara ano de Sydney E-Societo, kiu estis la sola inter la tri kies kontribuajo havis nenian gramatikajn erarojn, kvankam nur komencanto. (Je alia loko

de nia gazeto ni publikigos la 3 plej bonajn kontribuojn de la leter-konkurso.)

La kongres-prezidanto (s-ro Torr) transdonis libropremion "Life of Z. amenhof" al Kongresano N-ro. 107, kiu estis 14-jara knabo el Adelaide—Ian Jones.

S-ino Grace Barlow proponis ke la kongreso sendu delgitaron al la somer-lernejo de "New Education Fellowship", kiu okazis samtempe kun la kongreso. "Estus konsilinde havi bonan kontakton kun tiuspeca organizo kaj klarigi al la instruistoj de tiu ĉi progresema movado la celojn de Esperanto", s-ino Barlow diris. Ŝian proponon la kongreso akceptis, kaj la sekvontan tagon Ges-roj Torr, D-ro Williams kaj s-ino Barlow vizitis la somer-lernejon de N.E.F. Post salutoj de D-ro Williams, nome de la kongresanoj, s-ino Barlow donis bonan raporton pri nia lingvo kaj movado.

Kongresa Laboro.

A.E.A. kunvenoj alternis kun U.E.A. kaj S.A.T. fakkunvenoj. U.E.A. ĉefdelegito por Aŭstralio, s-ano Ken Linton gvidis la U.E.A. kunvenon kaj alvokis al pli forta subteno de la neŭtrala movado. Pro ne-ĉesto de S.A.T. Peranto M. Leereveld (Hobart), s-ino Grace Barlow gvidis la fakkunvenon de la laborista mondorganizo.

Ĉefa ero de la A.E.A. kunvenoj estis diskuto pri la asocia organo. Laŭ (skriba) raporto de s-ro F. R. Banham kaj (buŝa) raporto de s-ro McKenzie, la enspezo ne sufiĉas por eldoni la gazeton ĉiumonate, do la demando, ĉu eldoni presitan gazeton 6 foje jare, aŭ multobligitan gazeton 9-10 foje. La plimulto preferas presitan gazeton. S-ro Matasin estis komisiita pristudi la aferon, ĉu pli mal-kara presado eblas.

La elekto de la nova A.E.A. estraro jam okazis laŭ la regularo akceptita dum la lasta kongreso en Perth. Laŭ ĉi tiu regularo ne la membroj, sed la delegitoj de la aliĝintaj societoj voĉdonas. Perth havis 3 voĉojn (f-ino Bull), Melbourne 3 voĉojn (s-roj Linton, McKenzie, Koppel), Sydney 2 voĉojn (s-ro Matasin, f-ino Dash), Brisbane 1 voĉon (s-ro Grant), Canberra 1 voĉon (s-ro Torr), Adelaide

1 voĉon (f-ino Addis). Estis 8 kandidatoj por la 7-membra estraro, do okazis sekreta baloto flanke de la delegitoj. Elektigis: s-ino Torr, f-ino Bull, s-roj Dr. Williams, Parry, Linton, Latimer, Koppel.

Sub la prezido de la lasta A.E.A. Prezidanto, s-ano Linton, okazis poste la unua estrarkunveno. S-ro Linton dankis ĉiujn pro la farita laboro dum la pasinta 2-jara periodo kaj samtempe petis ke li preferu ne kandidatiĝi denove por la posteno de la prezidanto.

La sekvanta nova estraro:
Vic-Prezidantoj: s-ro S. L. Parry (Brisbane), s-ino J. Torr (Canberra)

Sekretario: s-ro Herbert Koppel (Melbourne)

Kasisto: s-ro Ken Linton (Melbourne)

Estraranoj: s-ro R. Latimer (Nowra), f-ino E. Bull (Perth)

Seminario kaj Prelegaro

Kiel ĉe la lastaj kongresoj okazis ankaŭ en Canberra Lingva Seminario dum la matenaj kunvenoj, kaj prelegaro dum matenaj kaj vesperaj kunvenoj.

Grandan dankon de la anaro meritas Ken Linton, kiu tiel zorge preparis siajn lingvajn prelegojn, kiujn li prezentis en maniero ke eĉ la ne-fakulo povis facile sekvi lin. "La Akuzativo", "La Refleksivo" kaj "La Metriko en Esperanto" estis la interesaj temoj.

Sidnejanaj ĉi-foje faris la plej multajn prelegojn. S-ro W. Chandler prelegis pri "Ekskurso en la Estintecan" en kiu li skizis la geologian historion de nia mondo, S-ro Fritz Mueller-Sorau, kiu naskiĝis en Germanujo kaj lernis Esperanton en Sydney dum nur unu jaro, prezentis prelegon pri "La Vojo al Sano kaj Feliceco". Temis ĉefe pri vegetara vivmaniero kaj ŝercaj "interjetoj" de viandmanĝantoj ne mankis, sed la preleganto sukcesis kapti la intereson de ĉiuj. "Famaj Aŭstraliaj Punlaboristoj" estis la temo de historia prelego de s-rino Grace Barlow. Ŝi estas instruistino pri historio kaj tial konis bone la temon de sia prelego. Ke tri samideaninoj forlasis la halon ĉar ili ne povis "toleri" la realismajn priskribojn de Grace, certe ne ĝenis la aliajn aŭskultantojn, kiuj samopiniis ke de eraroj de la pasinteco oni lernu por la nuntempo kaj

estonteco. Nia franca amiko Rene Asselin prelegis pri "La Monumentoj de Parizo" kaj ilustris per kliŝoj. S-ro Noel Gamble prezentis paroladon kun belaj memfaritaj lumbildoj pri sia vojaĝo tra Eŭropo kaj vizito al la Bologna E-Kongreso. Kiel en Perth, ni povis prezenti prelegon de Pastro C. Cowling (Lismore), kiun pro lia neĉeesto legis s-ano Herbert Koppel. "Inter-Epokeco kaj Esperanto" estis la temo, kvazaŭ daŭrigo de lia Perta prelego pri "Frua Internacia Lingvo". Li pruvis per antikva literaturajo ke verko vivis nur pro internacieco, kiu siavice egalas Inter-Epokecon.

Distra Programo

Aliaj distraj kaj turismaj aranĝoj kompletigis la tre riĉan kongresprogramon. Post aŭtobusa rondveturado tra la belega ĉefurbo (3.1), sekvis duontaga ekskurso al la granda digo de la Cotter-Rivero, de kie Canberra ricevis sian akvo-provizon (4.1). Samvespere du Esperanto-filmoj estis montritaj: "Danlando" kaj "Aŭstralio Hodiaŭ", kune kun filmoj el Kanado. Ke ni fine sukcesis akiri la danan filmon kaj tiun pri Aŭstralio, ni dankas al s-ro Gamble, kiu kuris de unu registara oficejo al alia, persone aŭ telefone pledis kun la doganejo, film-cenzuristo kaj Departemento de l'Interno. Vizito al la Parlamento (5.1) estis ne nur interesa, sed ankaŭ instrua, ĉar ĝi enkondukis nin en la historion de Aŭstralio. La "Internacia Koncerto" en la granda Albert Halo estis iom ambicia entrepreno de niaj amikoj de Canberra. Plenigi la grandan halon, kiu povas enteni 750 homojn, estas malfacila tasko, precipe dum la somero. Proks. 275 personoj ĉeestis kaj oni prezentis bonan programon de diversnaciaj popoldancoj kaj -kantoj. Bela okpaĝa koncert-programo kun bonaj reklamoj pri Esperanto kaj financita pere de anoncoj, kiujn la multflanka s-ino Torr sukcesis havigi de lokaj komercistoj, estis denove pruvo pri la organizkapabloj de s-anoj en Canberra. Esperant-lingvaj afiŝoj en la montrofenestroj de la reklamantoj alvokis kongresanojn aĉeti varojn ĉe tiuj komercistoj kiuj subtenis la kongreson. (Jen bona propagand-ideo por estontaj kongresaranĝantoj.) Finiĝis la kongreso per amuzvespero (7.1), ĉe kiu oni mon-

tris filmojn pri Japanujo, afable pruntitaj de la japana ambasadejo.

Je la fermo de la kongreso—ĉiu klubo ricevis donacon de la Canberra klubo, fajnecan cindrujon, memfaritan de s-ino Joyce Torr. La 10-a Australia Esperanto-Kongreso estis vera sukceso, ĉe financa, dank' al la kapabloj de Joyce kaj Harry Torr, de Noel Gamble, la granda helpo de s-ino E. Hall, kiu provizis la anaron matene, posttagmeze kaj vespere per refreŝaĵoj kaj de Sandor Fulop. La profito de la kongreso estis proks. £100, sed detalan raporton pri tio ni publikigos venontnumere.

Tro rapide forpasis semajno en Esperantujo! "Venis samideanoj, sed foriris fratoj", estis la deziresprimo de s-ro Ralph Harry, aŭstralia ĉefkonsulo en Genevo, esprimita en leteroj al la kongreso kaj asociaj sekretarioj. Kaj tiel estis! Restis nur la espero revidi unu la alian en Januaro 1958 ĉe nia 11-a aŭ en Brisbane aŭ Sydney.

LETER-KONKURSO.

Kara Amiko,—Vi jam aŭdis multe pri la ĝojo de la Kongreso. Nun iom pri ĝia laboro.

En la unua kunveno, oni elektis unu homon el ĉiu ŝtato kiel ĵurnal-reprezentanton, kaj tiuj personoj kunvenis ĉiutage por prepari raportojn por sendi al la anglalingvaj ĵurnaloj. Ankaŭ tiuj respondecis pri trovo de interesaj, intervjuindaj homoj, kiam venis ĵurnalistoj al la Kongresejo.

Jam kelkajn monatojn antaŭ la Kongreso, la organizintoj aŭskultadis la radiostaciojn, kaj rimarkis la elsendperiodojn, kiuj eble interesigus pri Esperanto. Ili kontaktis tiujn, kaj dum la Kongreso la radiuloj intervjuis aŭ paroligis kelkajn partoprenantojn.

La granda publiko ja iom aŭdis kaj legis pri Esperanto, kaj scias, ke ĝi vere kaj inde vivas.

Nun oni devas daŭrigi senlace tiun komencitan laboron, kaj ne lasu la kontaktojn forfali pro manko de intereso niaparta. → Samideanajn salutetojn de EDNA DASH (Sydney Esperanto Society).

2-A PREMIO.

Mia tre Kara Amiko,—Kiel mi povas esprimi miajn dankojn por via

invito, ja insisto, ke mi ĉeestus la 10-an tut-Aŭstralian Kongreson en Kanbero?

Mi volus diri, ke se mi ne estus ĉeestinta, mi preterlasus tre mirindan plezuron, kaj ne renkontus amikojn kiujn mi antaŭe konis nur per nomo. kaj sekve mia vivo estus pli malriĉa. Dankon, amiko mia, multan dankon.

De la komenco, ĉio tre bone progresis. Pro la prelegoj, kunvenoj, koncerto kaj socia vespero k.t.p. mia kompreno de kaj la lingvo kaj la movado ĝenerale pliprofundigis.

De nun mi estos tre entuziasma Esperantistimo kaj mi plejplezure atendos venontajn kongresojn.

Kun korsentaj salutoj kaj dankoj, via samideanino, JOYCE TORR (Canberra Esperanto Club).

3-A PREMIO.

Kara Amiko,—La Kongreso estis ege bona! Kial vi ne venis?

De la unua momento oni parolis nur Esperante. Eĉ mi balbutis iom je la unua vespero—kaj post du tagoj mi ja komprenis multon, kaj mi parolis multe pli kuraĝe ĉar ĉiu sperta Esperantisto helpis kaj paroligis min.

Mi estas komencanto, sed mi neniom sentis, ke iu ajn senpacienciĝis pro miaj malĝustaj provaj. Ĉie estis sento de amikeco. En tia atmosfero, kreskos ne nur parolantoj de Esperanto, sed veraj Esperantistoj.

Sincera via, J. DOCKSEY (Kamara Ano de Sydney Esperanto-Societo).

Australia Kroniko

Perth: Eble vi supozis ke la Okcident-Aŭstralia Esperanto-Ligo ĉesis funkcii, sed ni ja ĝuis dum la pasinta jaro tre interesajn kunvenojn. Dum la jaro ni gastigis ses gesamideanojn el aliaj ŝtatoj kaj daŭrigis niajn bonajn rilatojn kun aliaj organizaĵoj, kiel la "Bon-Najbara Konsilantaro", la "Internacia Bonvola Ligo", k.t.p. Krom ĉe monataj kunvenoj, ni ankaŭ kunvenis ĉe societaj vesperoj ĉiun trian monaton.

Nia Generala Jarkunveno okazis 8 Decembro. Jen la nova komitato: Prez. s-ro J. Hawks; Vic-Prez: f-ino O. Stempel; Sekr.: s-ino E. Pianta; Bibliotekisto: s-ino M. Sedgley.

Publikeca Oficisto: f-ino A. Longson; Socia Sekr.: s-ino Hitch.

La lasta de la societaj vesperoj estis la Zamenhofa Festo, kiu okazis 15 Decembro 1955. Post tagmanĝo en la Hotelo Shaftesbury ni kunvenis en la "Perth Literary Institute". Placiis al ni bonvenigi inter ni D-rinon Vera Summers, kiu revenis el Eŭropo. Ŝi rakontis pri la Universala E-Kongreso en Bologna, kie ŝi oficiale reprezentis la Aŭstralian Esperanto-Asocion. S-ro Saar, kiun ni bonvenigis post malsano, prezentis la atesojn al la sukcesaj studentoj kiuj partoprenis la ligajn ekzamenojn dum la jaro.

Ni ankaŭ bonvenigis inter ni denove post malsano s-ron Walker, s-inon Pollard kaj s-inon McGrath. Gratulon al ges-roj McGrath pro naskiĝo de dua filo. F-ino Leach intencis flagi ĉirkaŭ la mondo kiam ŝi forlasis Perton en Septembro. Ni antaŭvidos ŝian revenon por aŭskulti al ŝiaj spertoj dum ĉi-tiu vojaĝo.

—A. Longson.

Adelaide: S-ano H. Fidge sukcesis aperigi longan artikolon en la gazeto "The Shop Assistant", sud-aŭstralia organo de la sindikato de vendistoj, kiu certe estas bona propagando por Esperanto.—Win Addis.

Brisbane: Daŭre antaŭ la popolo en Brisbano estis Esperanto dum la pasintaj kvar semajnoj. Okaze de la Festo, Nacia Radio-stacio 4QG petis informon pri la movado, kaj du fojojn tiudate dissendis kvin-minutan prelegon dum la Novajo-programo.

3 Januaro "Brisbane Courier" pre-sis anoncon pri la Deka Kongreso kaj atentigis pri la propono enkonduki Esperanton en la lernejojn.

En la sama tago Radio stacio 4BC dissendis raporton pri la Kongreso kaj ankaŭ precipe menciis la lernejo-proponon.

9 Januaro Radio Stacio 4BC petis intervjuon de la Prezidanto de la Brisbana Societo. S-ro Parry rakontis pri aktualajoj rilate la movadon, kaj la intervjuon la stacio sonstrie registris kaj dufoje dissendis dum programo "Radio Newsreel". Precipe la intervjuanto interesiĝas pri la UNESCO-decido kaj donis emfazon al tiu punkto dum la intervjuo.

14 Januaro "Brisbane Telegraph" pre-sis anoncon pri la sukceso de S-ro G. A. Grant ĉe la Pyke Ekzameno,

kaj ankaŭ presis artikolon pri la lingvo kune kun portreto de la Prezidanto de la Brisbana Societo.

Interesa sekvaĵo de la "Telegraph"-artikolo estis vizito al la hejmo de Ge-sroj Parry de Ge-sroj W. E. Pyke. S-ro Pyke, F.R.S.A. (London), Chartered Engineer (Aust.), estas nevo de J. G. Pyke, kies memoron la ekzameno honoras. S-ro Pyke rakontis multajn interesajn pri la eksterlanda vojaĝo de sia onklo, kaj bedaŭras la fakton ke li mem ne estas Esperantisto. Interesas lin ekscii ke oni tiamaniere faris honoron al S-ro J. G. Pyke, ĉar, ĝis li legis la artikolon en la ĵurnalo, li nenion aŭdis pri la ekzameno.

—S. L. Parry.

Melbourne: Preskaŭ 60 ges-anoj kolektiĝis en la salono de "Caris Club" je 15/12 por festi la Zamenhofan Tagon. Post enkondukaj vortoj de la Prezidanto (s-ro E. McKenzie), kantis s-rino Cochran anglalingvajn popolkantojn. S-ro W. J. Drummond deklamis "La Vojo" de la Majstro kaj s-ro McKenzie kantis E-lingve. S-ro H. Koppel deklamis la humoran poemon de Julio Baghy "Estas mi Esperantisto!" La festparoladon faris ĉi-jare s-ino P. Hanks, kiu elektis la temon: "Virinoj en la E-movado". Ŝi rakontis pri la verkista laboro de la estonino Hilda Dresen kaj la anglino Margaret Jones-Blaise kaj finis per la vivhistorio de s-ino Zamenhof, la edzino de la Majstro. Ŝi konvinke pruvis al ni ke sen la sindonema subteno kaj kredo de s-ino Zamenhof, la Majstro neniam estis povinta krei sian mirindan lingvon. Post tiu ĉi bonega festparolado, s-ro Drummond anoncis la gajnintojn de la Pyke-Ekzameno kaj oni prezentis magnetofonan paroladon de D-ro Edmond Privat. Floroj, donacitaj de s-ro Lanyon, estis prezentitaj al s-inoj Cochran kaj Hanks. Post la vesper-manĝeto, s-ro McKenzie, nome de la klubano, prezentis belan arĝentan te-poton al ges-roj Koppel, kiel adiaŭna donaco. Ili transloĝiĝis al Sydney, kie s-ro Koppel laboros en la fabrikejo de s-ano J. Matasin.

Bonvena gasto en januaro estis f-ino Ursula Walde, juna kaj entuziasma E-isto el Germanujo. S-anoj Walde estas nun fakinstruisto por manteksajo en Mittagong, N.S.W. Ŝi

vizitis nian klubon 3-foje kaj unufoje provizis la programon, rakontante kiel ŝi E-igis kaj kiel ŝi vojaĝis tra Esperantujo. Dum ŝia ĉeesto aranĝoj estis faritaj por eble organizi E-an Renkontiĝon de E-istoj el Sydney kaj Canberra en la bela urbeto Mittagong kaj ties bonekonata lernejo por knabinoj, kie Ursula instruas.

HILDA DRESEN VIVAS.

Rusa sam-ino rakontis en letero el Moskvo al Ĉ. S-ujo pri 3-semajna vizito al la fama E-a poetino Hilda Dresen.

Ŝia fratino, Helmi, estis pafita de Germanoj ('Esp. Int.' 9/42).

AŬSTRALUJO!

Denove ni protestas kontraŭ uzo de "Aŭstralujo" anstataŭ "Aŭstralio"—la Zamenhofa formo kaj ĉiel imitinda. La unua, kaj malgusta formo aperis en Oficiala Komunikado, de la 41-a U.K. de E-o. Ni estas Aŭstralianoj, ne Aŭstraloj.

MAMADORO!

"La Dia Regno" (Dec.) informas, ke la mondo "adoras Mamon". Juĝante laŭ la belbustaj fotoj en niaj popularaj gazetoj, ni povas kredi tion. Tamen ni sugestus, ke nia religia kolego-organo pliguste uzus "Mamono" (Mateo 6/24; greke, mamoono).

Jen vi vidas, en kian embarason povas trafi homoj, kiuj ne scias aŭ ignoras nian unu Esperantan Bibliion.

Kiel stilmodelo kaj tingvuza unuecigilo, ĝi estas ege valora, sed ankoraŭ iuj homoj similas al porkoj malŝatantaj perlojn.—F.R.B.

Supra bilĉo: La Komitato de la 10a Aŭstralio E-Kongreso. De dekstre al maldekstre: S-ro E. McKenzie (Melbourne), s-ino Joyce Torr (Canberra), s-ro Noel Gamble (Canberra), D-ro Fred Williams (Melbourne), s-ro Harry Torr (Canberra), s-ro Ken Linton (Melbourne), s-ro Herbert Koppel (Melbourne).

Malsupra Bildo: La Kongresanaro. (The zinc plates for these Congress photographs were generously given by the Apex Engraving Co. Pty. Ltd., Melbourne, as a mark of sympathy with our movement, through our Treasurer, Mr. Ken Linton.)



SUBSCRIPTIONS.—Messrs. C. P. Winchcombe, F. R. Banham, E. Crowe, E. Hearne, H. W. & H. M. Cohen, S. Burstin, P. E. Schwerin, Ottens; Misses R. G. Telfer, J. C. Kempson, M. Day, M. Hodge, G. Calwell, Samblebe; Mesd. E. M. Hill, O. Glenie, C. Firenze, Fes, E. Byatt, 12/6. Sales, 22/-.

Thanks to all, especially to Miss A. Curtis, 20/-; Dr. F. Williams, Mr. K. Linton, Mr. J. Eliot, 21/-; Mr. Mummery, 15/-. Messrs. H. R. Torr, N. F. Gamble, J. Sullivan, G. Grodz, S. Milligan; Mesd. E. Hall, M. Cottingham; Miss K. Morris, 12/6.

COTTER DAM!

Mi bedaŭras la neklaran foton sur p. 108. Por mi ĝi image prezentas kalke-blankajn klifojn de Anglujo, dum dika nebulo vidatajn de homo suferanta de kataraktoj en ambaŭ okuloj. Pardonu!—Red.

PYKE EXAMINATION.

Ten entered. The standard was not high, the average points gained being 56 1/5. One or two were accepted as candidates by sponsors who had forgotten the advice given in the circular. Mr. G. A. Grant's (86) and Mr. F. Mueller-Sorau's (72) were, however, commendable, and witness to the relatively high competency in Esperanto attainable within a year. Mr. S. Milligan (59) was the best of the others.

This year emphasis will be placed on strict adherence to the rules as set down by the Examining Panel.

The next Examination is set for November 1956. Those intending to sit for the prize of £5 should now be through the introductory part of their studies, and resolved to apply themselves intensively to the subject in the coming months.

MESAĜO DE LA PREZIDANTO.

Karaj geamikoj: Mi dankas vin, ĉar vi elektis min via prezidanto. Mi intencas daŭrigi la studadon de Esperanto kaj prepari por unu el niaj novaj ekzamenoj.

Nuntempe mi posedas iom pli da libertempo ol antaŭe, kaj mi deziras helpi mian lokan klubon pli ol antaŭe. Mi daŭrigas mian propagandan laboron. Estas mia deziro helpi la movadon en lokoj, kie ĝi estas iom

malforta. Kion vi faros?—Via sincere, Fred Williams.

"OLYMPIC GAMES"?

Estas konfuzo pri la maniero traduki tiun esprimon. Ni vidus Olimpia, Olimpika, Olimpiada en diversaj tekstoj, kaj tio povas nur ridindigi nian lingvon. Bone estus, se la Lingva Akademio donus sian konsilon pri la demando.

Atendante ĝian bonvolan konsilon, mi rekomendas "Olimpo" por la loko; "Olimpa" por la adjektivo—Olimpaj Ludoj. Aprobas tiujn formojn la sekvantaj vortaroj:—

Rhodes; Fuleher & Long; Millidge;

The Edinburgh; Nylen (Sveda-Espa); Inglada Ors (Hispana-Espa); Mees (Nederlanda-Espa).

Olimpiado propre signifas la kvarjaran intertempon inter la Olimpaj Ludoj; sed per sencentendiĝo ĝi nun estas uzata pri la Ludoj mem. Traduku en tiu okazo per "Olimpiado", donita inter aliaj de Hans Wingen, kaj Butin-Sommer.

Kun la alproksimiĝo de la Ludoj, ni E-istoj certe havos okazon ofte ilin mencii, eventuale eĉ kompili plimalpli imponajn broŝurojn kaj reklamojn temantajn pri la Ludoj. Ni do nepre strebu al termina unuecigo, kaj ne lasu nin aperi antaŭ la granda publiko kiel homoj, kiuj ne interkonsentas inter ni pri ofte-uzataj kaj komunaj vortformoj.

NORMA ELEMENTA DIPLOMO.

S-ino RUTH McGRATH, 41 Reynolds Road, Applecross, West Australia, sukcesis kun honoro pri la N.E.D. Ni kore gratulas ŝin!

"WITH HONORS."

Certe ne uzu "kun honoroj". Verdire, la esprimo "kun honoro" ne estas logika aŭ sencredona. Ne temas pri honoro, sed pri laŭdo (fare de la ĵugantoj), aŭ laŭdindeco (rilate al la ekzamena provo studenta). Komparu: Latine, Cum laude.

La uzo de "honoro" rilate al diplomoj, tamen, estas ĝenerala kaj jam de tre longe uzita; tial nur malforte oni povus esperi, ke la koncernataj instancoj ŝanĝus la esprimon.—F.R.B.

SUDANANIDINETO, "a little Sudanese baby girl". Ni preferas "malgranda Sudana knabineto".

La Rondo

The Australian Esperanto Monthly

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondukuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.

Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

Vol. 12, N-ro 71.

MELBURNO.

Apr.-Julio, 1956.

ADVICE TO EXAMINEES

By Rev. Cedric C. Cowling, Lismore, Victoria.

So many Australian Esperantists are interested in examinations, that after twenty or more years' experience in marking their papers, I venture to suggest the following, so that they may approach their papers more competently.

(1) Read the paper with great care, and obey all directions exactly. If you are given alternatives from which to choose, answer no more than the required number. There is no advantage at all in doing more.

Nor do you gain anything by rambling round the point. If asked a question on the reflexive pronoun, you would gain no marks even for the most brilliant treatment of the accusative case.

On the other hand make very sure that you do all the work asked for. Many candidates lose heavily in this matter.

(2) Attend carefully to paragraphing and punctuation. See that all accents appear. If you forget the circumflex in "muŝo" you may ruin an otherwise adequate answer.

(3) In translation do not paraphrase. The examiner is not interested in how you can twist sentences, but in whether you can translate. If he has set you a piece containing compound tenses, he will mark you wrong if you substitute a simple tense. "Mi kaptiĝis" may be near enough elsewhere for "I have been caught"; but not in an examination where your command of verb

forms is being tested. The same applies to passive sentences, where so many candidates unconsciously substitute an active verb with "oni", e.g., "Oni kaptis lin" instead of "Li estis kaptita."

(4) Be careful about spelling. Even in Esperanto errors are possible and frequent.

(5) Requiring special care, as being among the words often misused are: agonio, aktuala, akurata, apologio, aŭtoritato, brava, domaĝi, eventuale, konkreta, konsekvenco, kontroli, insulti, magistrato, novelo, oferi, parenco, patosa, pamfleto, placo, rezigni, riverenci, sentenco, taksi, triviala, verso.

Others are: amori (compare ami); tino, pramo, kompleto.

The Esperanto definitions should be aligned with the English meanings and studiously compared.

(6) Avoid clichés and national idioms, expressing their meaning rather than translating the words of the national language. To test you, examiners often include an expression such as "to call a spade a spade."

(7) Write very clearly. Do not try to save paper. If you type your answers, double-space your lines. Always leave wide margins. Do not use ball-point pens.

(8) Arrange your answers in logical form, and offer your attempt adequately but concisely, not, however, in note-form.

(9) Revise and edit your work.

(10) Finally, I would suggest that you keep and study all language notes that appear in "La Rondo." They are of great value not only in themselves, but also in developing an informed and critical mind in linguistic studies.

Australia Kroniko

PERTH: Dum Januaro, kvankam la klubo ne oficiale funkciis, kelkaj mallongaj raportoj aperis en la loka ĵurnalo pri la Australia Kongreso, kaj pri la vizito de Doktorino Summers al la Internacia Kongreso en Italujo. La Australian Broadcasting Commission disvastigis du raportojn dum la novaĵa sesio, kaj donis al Doktorino Summers intervjuon en la Sesio por virinoj. Bona propagando por la Nov-Jaro!

La unua afero de la ligaj aktivecoj estis river-pikniko Dimanĉon la 5an de Februaro. Ĉirkaŭ 30 anoj kaj ties amikoj tre ĝuis la vojaĝon sur la rivero dum tre bela vetero.

Je la 9a de Februaro okazis la unua kunveno de la Ligo. Doktorino Summers donis al ni tre interesan paroladon pri kelkaj okazoj dum sia vojaĝo transmare. Krom la Kongreso en Italujo, ŝi vizitis kelkajn lernejojn en Anglujo, Francujo, Nederlando, kaj Aŭstrujo.

Poste, Fraŭlino Bull parolis pri sia vizito al la 10a Kongreso en Canberra. kaj donis al la Prezidanto, Sinjoro Hawks, malgrandan pladon, senditan de la Canberra Klubo kiel memorajo de la okazo.

WHY THE DELAY?

We deeply regret the delay in publication. Our secretary has had much to contend with in the last few months; and the editor has been out of the State for a month. An Aug.-Sept. issue is due to appear in September, then three more issues in Oct., Nov., and December. This would give six issues for the year. Thank you for your patience and fidelity.

TRANSLATION COURSE for those desiring to improve in literary expression. Yearly 12/6, twelve sets, monthly. Write Editor.

Recenzoj

ROZOJ KAJ URTIKOJ, de Poul Thorsen, kun antaŭparolo de William Auld. 117 paĝoj, 36 poemoj tradukitaj el la Dana, kaj 27 originalaj. Eld. Komuna Konversacia Klubo, Kopenhago. 13/9 Aŭstralie.

Ĝen bukedo el la korĝardeno de unu el niaj nuntempaj steloj de la Esperanta firmamento. Laŭroj pro ok poemoj jam sidas sur lia honora kapo. Sur la arboj de l'Parnaso kreskas ankoraŭ da folioj destinitaj al tiu loko.

La "Ritorneloj" ĉarmas per sia metrika muziko, sed por multaj ilia senco evitos kapton. "La Knabinoj en Hispanio" bele kombinas la du sukcesojn—virtuozo arta kaj penses-primo klara. La linioj de Munch-Petersen ne estas versoj, sed presteknika aranĝo fraza; forigo de la streketoj postliniaj, kaj uzo de paragrafoj tion pruvus.

Thorsen lerte rimas kaj petole pensludas, iufoje turnante sin al observo de la malgajaj elementoj en la vivo. Li prezentas varian versajaron, kiun plene ĝuos nur sentemaj poezi-amanotoj kun talento latentata aŭ aktiva, simila al lia.

En la kritika lingvaĵo de la biografetoj, estas evitinde ne troe imiti la kliŝecan stilon de la skolastiko, kiu atentis la formon kaj la vorton pli ol la esencon kaj signifon de la penso. Esperanto estas riĉa je propraj esprimebloj, kaj bedaŭrinde estas, ke homoj kun signife grava dirindajo iufoje kroĉas al formala frazeologio prefere ol serĉi trafajn parolturnigojn en la indiĝena internacia lingvo.

Kion ekzemple signifas: "Lia talento manifestiĝas per . . . firma formo"? En kiu maniero "firma"? "Liaj poemoj estas rimarkindaj pro tre densa kaj plene saturita enhavo"? "densa kaj saturita" per kio?

Tiaj esprimoj nur nebule donas formon al la penso de la verkanto; estas preskaŭ necese, ke iu povus ilin parafrazi kun fidcerto, ke per tio la senco estas klarigita.

"ADAM MICKIEWICZ", de Mieczyslaw Jastrun. Eldonita laŭ komisiio de Komitato de Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando, Varsovio 1955. 78 p. Prezo nemontrita.

La aŭtoro esploras la stilon kaj sencan de la poemoj kaj priskribas la soci-politikan agadon de la poeto. Li trafstreke informas pri la slavlingva laboro de M. ĉe la College du France (1840-44), kaj la Enciklopedio Brita konfirmas, ke la prelegoj de Mickiewicz, malgraŭ mankoj filologiaj, enhavas iom da valora literatura kritiko kaj montras intuan scipenetron en la historion kaj pensdirektojn de la slavaj rasoj. precipe la pola kaj rusa.

E-istoj konas la faman Polon nur per "Sinjoro Tadeo" kaj la du poemoj en la Fund. Krestomatio. Per la nuna verko ili ricevas vivan bildon de la diversdotita spirito, kiu povis elserĉi la hejmecon etoson de la idilia epopeo, kaj en "Avoj" dramefantaste esplori la misterojn de pagana folkloro sur vasta verskanvaso.

Simile al Byron, M. propre akompanis trupojn en teritorion por kiu li sopiris liberecon. Kiel Heine, li loĝis en Francujo, de kie li gazete polemikis favore al la intereso de sia popolo. Kiel Shelley, liaj apartaj ideokonceptoj portis lin en malfavoron ĉe la kleriga aŭtoritato.

Malsame ol alia fama disputisto, Viktor Hugo, tamen, li partianigis al la Tria Napoleono, kaj mortis 1855 en Konstantinopolo, kien li iris por formi taĉmenton kontraŭ la rusoj dum la Krimea milito, cele al demokrata levigo de ĉiuj nacioj premataj de la caro.

La libro estas nemalhavebla aldono al "Sinjoro Tadeo" kaj kompletigas ĝis kontentiga grado la antaŭparolon al tiu verko.

Lingvaĵo klara, sed mankas finpoluro. La ĉefa difekto estas eraro uzo de (ne)transitivaj verboj.

"FUNDAMENTA KRESTOMATIO", 17a eldono, The Esperanto Publishing Co. Ltd. Tre bona papero, fortike bindita; teksto nealligita; centoj da notoj de William Bailey, L.K., kaj Prof-o W. J. Downes, L.A. 446 p. 25/- Australie. ink. afranko, ĉe niaj agentoj.

Inter ni estas multaj homoj plenkore amantaj nian literaturon kaj avidaj plulerni pri ĝia esprimkapablo kaj stilstika evoluo. Sekvas do, ke ĉi tiu belega eldonaĵo troviĝos sub la okuloj, ne de tri-kvar, sed de plurdekoj, kiuj absorbiĝos en instrue prilumita verko, espereble la unua en

serio de tre valoraj represajoj.

Prinoti la verkon estis bona decido, kaj riĉe plivalorigas la kompilon. Kelkaj esprimformoj en la originala teksto estas, post 70 jaroj de Esperanta uzado, ne plu imitindaj, kaj kontraŭas la postan konsilon de Zamenhof mem. Entute do la principo prinotadi estas valida, malgraŭ ke la notintoj ŝajnas tie-tie iom trudi personajn preferojn—cetere respektindajn, sed ankoraŭ diskutablajn. Ekz., 110. 179; Zamenhof Bible uzis "bruto" por "cattle generally" (komparu: 373, multa knabino, kaj F.de Andersen vol. 2, p. 9, ĝardeno de brasiĝo; tinea (t.e. tineoj) Mateo (6/19); kaj estas diferenco inter "t'a maljunulino" kaj "tiela maljunulino"—(1) that kind of old woman. (2) so (very) old a woman. Ĉe iuj paĝoj notoj ne konformas inter si, ekz., 273, kvaronhoro; 69, horkvarono.

Transprenis la taskon de la mortinta W. Bailey homo de penso sendependa, Prof-o Downes, kiu iufoje proponis notojn ne plene konsentante kun sia kolego. Ĉe la poezia parto la notanta mano sin retenas, eble pro rima kaj ritma konsidero. Restas kelkaj strangaj sennote:—

380: "iu rigardas vin tra ĉielaj tra speguloj" (Komparu: La Rondo, Jan. '51, "La agrablono de la via la kareso . . . kaj la vajn la okulojn mi rigardis". Hamleto p. 26: La malsaĝeco via la grandega.) 377: (ili adoras vin) en blinde; neniu atingos la kaŝitan en interne (?). 357: Albiona—ĉu sennote Orientanoj tion komprenus?

Mendu la belan libron kaj ĝuu horojn plenajn de intereso kaj profito.

(Al petantoj mi sendus notareton pri ĉi tiu verko.—F.R.B.)

KANTOJ POR LA PACO, 19 poemoj de Canko Murgin, Malĉika 41, Sofia 29, Bulgaria. Jen nova talentulo, kiu vidigas la revekiĝon de E-o sialandan. Aŭdu riproĉon al homoj konataj ankaŭ al ni:—

Pro konsidero
Tute malplena,
Kaj senespero.
Pli ol venena,
Li ekhezitis,
Dronis en dubon,
Kaj ne vizitis
Plue la klubon.

"LA MALPRUDENTA SCIVOLULO", de Cervantes. Trad. Luis Hernandez, Recaredo 22, Ia., Valencia, Spain. 6/3 Aust. ĉe B.E.A. aŭ per agentoj.

TRADUKANTE klasikan verkon, kia "Don Kihoto", konsciencia homo estas trata de du flankoj—aŭ li fidele sekvu la frazkonstruon kaj stilajn apartaĵojn de la originalo, aŭ li kvazaŭ reverku komplikitajn vortarangojn kaj alimaniere esprimi eble tro subtilajn pensobildojn, kun celo klarlingve prezenti la ideojn de la aŭtoro.

D-ro Zamenhof mem, respondante kritikanton de lia traduko de "La Rabistoj" ("Lingvaj Respondoj"), trafis en similan malfacilon. Petante pardonon pri sia eventuale "malbona traduko", li rimarkis, ke en verko de longe mortinta klasikulo tiu aŭ alia frazo por iuj povas esti ne klare komprenebla; kaj li metis tiun kulpon sur la aŭtoron mem. Grandaj verkistoj pli zorgas pri la enhavo de siaj verkoj ol pri plena populareco de ilia formo, kaj komentarioj ofte estas necesaj ĉe por membroj de ilia propra nacio. Zamenhof ankaŭ konfesis, ke en "La Revizoro" iufoje troviĝas frazoj ne tuj kompreneblaj, sed atribuis tion al la aparte neklara lingvaĵo de Osip, mallklera servisto.

Cu estas utile peni "redoni" la kriptan lingvaĵon de iuj rondoj kaj sociotavoloj—dialektuloj, senkleruloj, ebruloj kaj aliaj misuzantoj de la nacia idioma? Tiaj apartaj jargonoj estas en si mem "lingvoj", kiuj bezonus tradukon en la klanlingvon de la popolo koncernata. Uzi dube-sukcesontajn artifikojn por "reteni la aromon" de tiuj misformajoj ŝajnas al mi penado vana, ĉe rekte malutila. Antaŭ ĉio la klareco! Prefere ni donu la sencan de la frazoj, laŭnecese aldonante apartajn prituŝojn, sed nur en tute pura Esperanto.

Tiu aparta demando ne rekte tuŝas S-ron H., tamen pri rilata afero li havas koncernenon, nome la klasike peza kaj iom densa irakomplikeco de la stilo Cervantesa. Generale sukceso lia provo transdoni la sencan kaj "aromon" de tiu nefacila idioma, verkita en tempo literature ornamriĉa kaj nesimpatia por ni modernuloj kutimigintaj al pli neta, tradira kaj kompakta pens esprimo. Fininte la

legon, ni sentas amaran amuzon pri la malprudenta edzo, kiu per amiko lasis sian edzinon sekse-tentiĝi—por rikolti multe da malfeliĉo. Tamen iuparagrafe li ne sufiĉe bone atingis la ĉefdezirataĵon en Esperanto—klar-eco kaj tujkomprenebleco.

"La Rondo", Jan. 1951, konsilis S-ron H. ke li lasu sian tradukon kontroligita per bona E-isto ne scianta la Hispanan lingvon, kun celo atingi tutmondan kompreneblecon. Tion li faris; la "malfacila teksto" estis zorge ekzamenita de du eminentaj s-anoj, D-ro Ferenc Szilagy kaj S-ro Saldanho Carreira. Malgraŭ tio, mi ne povas diri alie ol, ke paragrafojn en la verko mi certe rigardas kiel ankoraŭ pli polurindajn, reviziindajn. La tri kunlaborantoj cetere ne rimarkis: "la alia tago" (la sekvanta tago); "preni al" (en senco: forpreni de . . .) "terurigi" (teruri), inter aliaj.

Ĉiu serioza E-isto devus aĉeti la verkon, per tio helpante al sia kulturo, la laŭdinda entrepreno de nia Hispana amiko, kaj la E-a literaturo entuta.

LUDILOJ (Dua ABC-Libro): eld. B.E.A., 140 Holland Park Av., London, W.11. Prezo nemontrita. Aĉetu ĝin por viaj E-istigiĝoj.

R.—por retetoj.

La fiŝoj nespertaj
Kaptiĝas per retoj
De homoj tre lertaj.

BOOK SERVICE.

Mr. Mills in Brisbane has control of the service. The editor would like a full list of our agents for publication, with complete addresses.

SUBSCRIPTIONS.—Messrs. Morwick, R. L. Cecil, P. Holmes. Misses J. Williams, E. Styles, A. Paling, Dr. C. Caldera, Messd. Caldera. 12/6.

Sales, Melb. E. Club, 4/-.

Thanks to all, especially to Miss J. James, 20/-; Messrs. S. Ling, E. Hearne, 15/-.

NE MERITINDA.

Virino, al ebrietaspekta vagaĉulo ĉe dompordo:—"Vi devus trinki nur akvon. Tio estas por vi la plej bona."

Vagulo: "Kian rajton havas mi, nenigravulo, por ricevi nur la plej bonan?"

USEFUL ADDRESSES.

Melbourne: Club meets 18 George Parade, off 113 Collins St., 8 Wed. Ring JA 3483.

Canberra: 27 Froggatt St., Turner.

Sydney: 12 Ennis Rd., Milson's Point, Thurs. 8.

Brisbane: S. L. Parry, Ford St., Albion.

Adelaide and Perth: We await advice.

MASEL PROSE COMPETITION.

PRIZE: £5 for the best original prose work by an Australian or New Zealander in Esperanto. Any theme. Length: 1000 to 1500 words. Closing date, September 30, 1956.

Results in December forwarded to every participant. Judge's decision final.

Candidates must send their work titled but nameless, and place separately in an envelope inscribed with the name of the piece, a slip with the name and address of the author. In this way the identity of the writer is kept secret till after judging.

Retain copy of work, so as to avoid loss in transit. Type or hand-write clearly with interlinear spaces. The successful works may be published in Esp. gazettes.

If only one work is received the competition will be cancelled for the year, but the entry will be judged with others in the following year. An Esperantist having gained the prize twice is excluded. Please draw attention to this competition, open to all.

Secretary: Ruth McGrath, 41 Reynolds Rd., Applecross, West Australia.

La Bulteno de la Kanbera Klubo estas interesa kaj utila, kaj imitinda por la ceteraj kluboj. Krom daŭra kaj akurata informo al la membroj, ĝi enhavas interesajn paragrafojn pri la movado ĝenerale kaj prilingvaj diskutindaĵoj.

KORESPONDADO.

Lektoro en Uni. dez. kor-i pri sociaj, kulturaj temoj, interŝ. librojn, gazetojn. ĥus. p.k.

VASIL COCOV, str. N. Kofargiev 38, Sofia 6, Bulgaria.

Georgi Ĉakarov, Str. Struma 18, Burgas, Bulgaria.

Erhart Angermann, Rathewalde, Kreis Sebnitz, Germany (D.D.R.).

Krejĉik Kvetislav, instruisto, Horice v. P., Zerotinova U1. cp. 340, Czechoslovakia.

S-ino Gota Palm, pri Kristanaj temoj, kaj p. markoj. Traktorsgat. 6, Halsingborg, Sweden.

"Paco", organo de pacamantoj, 7/6 jare. S. Bennett, 62 Brighton Av., Croydon Park, N.S.W.

EPITAFIO.

Mian nomon se vi legos
Sur ĉi tiu memorŝton',
Ne murmuru tiam preĝon
Kun kapklin' al dia tron'.

Iun etan agon bonan

Anstataŭe faru vi;

Ĉiu tia preĝo, plia

Perl' en mia rozari'.

—Joab Eljot.

RECENZOTAJ.

ILUSTRITA VORTARO de Francisko Azorin (unua vol.). Impresaspekta, sed sencvalore dubinda en oĝtaj lokoj. Ĝi sekvas etimologiajn principojn, kiuj tie-tie kondukas en rektan absurdon.

SINJORO TADEO (dua eld.). Tekste fidela. teknike artisma, ekstreme malkara—entute mirinda presproduktio.

KONTRALTE (Marjorie Boulton). Atenton-tira poemarego de nia plej dotita Parnasanino.

KIO ESTAS LA VIVO? Ankoraŭ unu psike-religia verko de la kosmapensa Dana filozofo.

TARTARIN (Daudet). Amuza rakonto. Lerte sed iom Francismece tradukita.

MILITISTA FAKVORTARO.—Terminoj en kvin lingvoj. "Roto" mankas.

Write Box 2122T, Elizabeth St., Melb., to contact agents.

DOMOJ ZAMENHOFAJ.

Ne ekzistas plu la Z-a naskiĝdomo en Bialystok, pro alikonstruo de la Z-a Strato. Ankaŭ estis tute ruiniĝitaj dum la milito domoj ĉe la stratoj Zamenhofska 9 kaj Krolewska 41 en Varsovio, kie loĝis kaj mortis nia Majstro. Estas 12 Z-aj Stratoj en Polujo.—Heroldo de E.

LINGVAJ DEMANDOJ.

PREFERE OL (AL)?—Jen interesa ekzemplo de la batalo inter la lingva logiko kaj la nacilingva uzado. D-ro Dreher, L.K., konsilas "ol", ĉar "preferi" sence egalas "ŝati pli ol."

Max Butin, L.K., male pledas por "al", argumentante, ke en neniu lingvo nacia oni povas diri la ekvivalenton de "preferi ol" (vorziehen, preferer a, prefer to). Li konsilas uzi: "Mi preferas panon al kuko." La Plena Vortaro donas ambaŭ formojn.

Mi konstatas, ke "prefere ol" estas pli logika, indikante veran komparativon; kaj ke "prefere al" estas pli "internacia".

Zamenhof: "preferece antaŭ viaj fratoj" (Genezo 48/22); "Nomo bona estas pli preferinda, ol granda riĉeco." (Sentenco de Salomono 22/1). En la Nova Testamento: "Oni devas obei Dion prefere ol homojn": Agoj 5/29.

"Lukti kun (ne kontraŭ!) angelo", Genezo 30/8, 32/25. Tia uzo de Z. ŝajnas evitinda. Vidu en Plena Vortaro sub "kun" difino 6.

"Pantalonoj". Levidoj 6/10, 16/4. Hans Wingen skribis, ke eble Z. estis influata de la Germana (aŭ Judgermana?) lingvo. Ambaŭ Hose kaj Hosen povas esti pluralaj, tamen la dua estas jam malmoderna. Pantalono—A. trousers.

ENUI: Erare nomita transitiva verbo en la Plena Vortaro. Ankaŭ la difino en la Fundamento estas malkorekta: "annoy, weary". La korekta difino estas: "to feel dull, tired in spirit or mind".

Ĉu -igigi estas uzebla? Jes. Marko 1/17, mi igos vin fariĝi fiŝistoj (tial, mi fariĝigos vin . . .); Apok. 3/9, Mi igos vin . . . adorkliniĝi (= adorkliniĝigos vin).

"apenaŭ ne"—nearly almost, all but. P.V.—"la ventego apenaŭ ne dronigis la ŝipon". Psa. 73/2: "apenaŭ ne falŝanceliĝis miaj piedoj" (my feet were almost gone. . .). Alivorte, "apenaŭ ne" egalas "preskaŭ".

—F.R.B.

LA AKUZATIVO.

D-ro E. Privat en "Esperanto", Julio 1921: "Car, el 100 manuskriptoj, almenaŭ 85 entenas troajn akuzativ-

ojn, ni emas al la Zamenhofa konsilo: En okazo de dubo pli bone uzi ĝin tro malofte ol tro ofte. En mia 'Vivo de Zamenhof' mi skribis 'prenante kraĵojn en la mano' kaj 'metu la nomon homo super la naciaj'. eĉ 'anoncante polan lingvon kiel sia'. Zamenhof mem skribis: 'La ceteron ili rigardu kiel aldonoj'. . . . Studinte la frazojn, mi ankoraŭ preferus ne meti tie senutilan -n, gramatike defendeblan, kiu nur estus balasto. D-ro Corret bonvolu afable lasi min libera (kaj liberan)."

PACEMA REGINO.

Regino Elisabeto de Belgujo iris Varsovon por ĝui la Festivalon honore al Chopin. Invitis ŝin la Pola ambasadoro nome de sia registaro. La Ministro por Fremdaj Aferoj, S-ro P. Spaak, penis malemigi ŝin kontraŭ tio, ĉar li timis propagandon.

Ŝi respondis: Ĉu vi tiel parolus, se mi irus Francujon por muzika festivalo?

Li: Ne. La Okcidento ne malvarme militas kontraŭ Francujo.

Ŝi: Ankaŭ mi ne militas kontraŭ Polujo, nek malvarme, nek varme. Mi kontraŭas ĉiajn militojn. Mi petas al vi permesi al maljuna sinjorino ke ŝi batalu laŭ ŝia bontrovo kontraŭ la danĝero de la milito. Por miaj oreloj la melodioj de Chopin sonas pli agrable ol la bruego de atomeksplodo . . . La muziko proksimigas la popolojn, se ĝi prenas formojn aliajn ol simplaj militmarŝoj. Feliĉe Chopin ne komponis eĉ unu militmarŝon.

"POTENCEGA VENĜATAKO":

La politiko laŭ kio—se "ili" komencos militon—ni, vaporigataj aŭ rostataj, povos senti kontenton, sciante, ke "niaj" aeroplanoj kaj tele-raketoj faros tiel same al "ili" post du-tri minutoj.

Se "ni" komencos la militon, estos ĝuste "ilia" potencega venĝatako, kiu nin vaporigos aŭ rostos.

RIPOZO: "Via edzo bezonas multe da ripozo, sinjorino, kompleta ripozo," diris la kuracisto, esplorinte la malsanulon. "Jen prenu recepton por piloloj dormigaj . . ."

"Bone. Kiom da ili mi donu al li, sinjoro?"

"Ah, sinjorino, ni komprenu nin. Estas vi, kiu devas ilin gluti."

RELATIONS OF LANGUAGES.

The Slavic tongues show perhaps closer connections among themselves than most of the other Indo-European branches. An Italian and a Spaniard, or a Spaniard and a Portuguese, each speaking his own tongue, will understand each other with difficulty. None will understand a Frenchman or a Rumanian without special study. A German, a Hollander, an Englishman and a Swede will be unable to carry on intelligibly if each insists on using his own tongue. But a Russian, a Pole, a Czech and a Yugoslav can manage to achieve a fair degree of understanding. . . .

The Romance languages differ phonetically more than they do structurally. Written Portuguese, Spanish and Italian are to a large degree mutually comprehensible; but while a Spaniard and an Italian can manage to understand each other, a Spaniard and a Portuguese will encounter increasing difficulties, and an Italian and a Portuguese will have still greater trouble. French is phonetically in a class by itself and cannot be understood without special study by the speakers of any other Romance language, while Rumanian, which would not present insurmountable phonetic difficulties to an Italian or Spanish speaker, is structurally out of their reach. . . . Brazilians are very touchy about being linguistically lumped with their Spanish-speaking neighbors, and haughtily inform Americans who try to use Spanish with them that they would rather converse in English. . . .

English in the United States is of three main dialectal varieties: Eastern, Southern and Midwestern (or General American), with 20, 30 and 90 million speakers respectively. (See also a Pelican by S. Potter: Ed.). Besides this general map, there are city and immigrant localisms, such as Brooklyn-ese and Pennsylvanian Dutch.

The dialects of Britain are far more numerous and divergent than in America. There are nine principal dialects in Scotland, three in Ireland, thirty in England and Wales—this outside of Scots Gaelic, Irish (Ers:) and Welsh, which are separate languages of the Celtic branch of Indo-European. Among the chief Eng-

lish dialects are: Cornwall, Devon, Somerset, Dorset, Gloucestershire, Oxfordshire, Shropshire, Lancashire, Westmorland, Northumberland, Yorkshire, Lincolnshire, Norfolk, Cockney and Sussex. . . .

—“The Story of Language,
Mario Pei, 1953.

One can learn to speak and understand a language only by hearing and imitating speakers of that language.

—Leonard Bloomfield.

GRAMATIKAJ FINAĴOJ UZATAJ
MEZE DE KUNMETITAJ

VORTOJ.

- O—akvoveturi (Millidge), Anglingva (Mill.); akvovazo, novofestos (1 Sam. 11/14); viandodika (Rabeno 29; O.V. 140).
- A—duaklasa, kelkafoje, akrasenta (Mill.); longatempeco (Readmono 30/20); propradezire (2 Reĝoj 12/4); unuaulo (Amos 6/1).
- E—longedaŭra; akrevida (Mill.); unuenaskito, Angleparolanto; fremdelogado (Gen. 28/4); hejmesidantino (Psa. 68/12); kunevoka (Jesaja 31/4); kuneruliĝos (Jesaja 34/4).
- I—najlimasiĝo; vivipova (O.V. 34, 96, 381 k.a.).
- U—vivuado.
- N—ĉionscia, ĉionvida, apetonstimula, korponprema.
- EN—hejmena (Fundamento de Kva-kerismo, p. 61, Butler trad.) hejmenis; malproksimenpafanto (Iliado; Kofman).
- J—librojrimeno (Rabistoj 16).
- JN—ponardegojnjetistoj (Iliado, tradukis Kofman).

LAŬDEZIRE

Kara Onklo: Mi urĝe bezonas cent funtojn. Mi sendas al vi ĉi tiun leteron per komisiito, kiu atendos la respondon. Se vi vidus, kiel mi ruĝiĝas pro honto, ĉi tion skribante, vi certe min kompatus.

P.S.—Venkita de honto, mi kuris post la komisiito, por repreni la leteron. sed mi ne sukcesis lin atingi. Dio donu, ke la letero ne vin atingu!

Respondo de la Onklo: Kara Nevo, Estu konsolata, kaj ne plu ruĝiĝu. La ĉielo plenumis vian deziron: la komisiito perdis vian leteron.

POŝTADRESOJ.

Pri adresado de sendaĵoj alilanden. Sur la kovertoj prefere uzu la landnomon vialingvan, ol la Esperantan aŭ la landnomon lingve de la adresato: Denmark, ne Danujo (-io) aŭ Danmark. Ne prene E-igu stratnomojn. Estas nesage, skribi ekzemple, Nova strato, Espero krescento, Alta avenuo, anstataŭ la ĝustaj New Street, Hope Crescent, High Avenue, kiuj estas la nomoj konataj de la poŝtliverantoj.

Fervoraj komencantoj iufoje lasas sin tirigi en tiun strangan kutimon, kio tre verŝajne rezultas en perdo de sendaĵoj.

Se vi dubas pri adreso de alilanda amiko, faru la plejblon skribi lian klaran adreson, sed aldonu, en angulo koverta, la adreson de la tiurba E-klubo, por ke, en okazo de nekono pri la individua, persona adreso, la klubo, ricevinte la leteron, povu plusendi ĝin al li. Por tio vi bezonas la jarlibron de U.E.A.

A world language is more important for mankind at the present moment than any conceivable advance in television or telephony.

—Lewis Mumford.

NESAGA KOKINO.

Vulpo manĝis kokinon, forlasintan la gardejon por vagi en arbaro.

"Vidu, Rozeto," diris la patrino, kiu volis profiti la okazon por instrui al la filineto lecionon pri la moralo. "Vi vidas tion, kio okazas, kiam oni malobeas. La kokino ne estis saĝa, kaj la vulpo ĝin manĝis!"

Rozeto meditis momenton, tiam demandis: "Se ĝi estus saĝa, ni, ĝuste ni, estus ĝin manĝinta, ĉu ne vere?"

ESPERANTO ĈE LA RADIO
Aŭskultu lunde, 10-an de Sept.
je la 7.45-a p.t.m. Orient-Aŭstralia Tempo al la A.B.C. Naciaj Stacioj. Dum la elsendo
"WE'RE ASKING YOU"
parolos A.E.A. Sekretario s-ano
HERBERT KOPPEL.

GESAMIDEANOJ!

Kvankam mi ege bedaŭras la malakordon inter la Usona E-istaro, mi intencis ĝin malatenti, sed ankoraŭ silenti mi ne povas, ĉar la neŭtraleco kaj honoro de nia amata U.E.A. estas tiel atakita, ke mi sentas devon ĝin defendi, klarigante aferojn al la Aŭstraliaj U.E.A.-anoj.

Kiam la ŝajne politikema E-Asocio de Nordameriko eksigis plurajn anojn pro politikaj diferencoj, la eksigitoj sin formis en novan organizon—E-ista Ligo de Nordameriko—kaj petis aliĝon al U.E.A., kiu ĝin akceptis je la ĉagreno kaj kolero de E.A.N.A. Ĉi tiu nun akuzas U.E.A.-on pri komunismaj tendencoj. Mi certe konsilas, ke ĉiu intereso ne prene legu la artikolon de nia prez-o, E. Malmgren, p. 17, "Esperanto" (Feb.) kaj la defendon de la prez-o kaj sek-jo, p. 48 (Mar.).

Tion konsilinte, mi deklaras mian senkondiĉan lojalecon kaj plenan konfidon al la prez-o kaj komitato de U.E.A.

K. G. LINTON (ĉefdel. U.E.A.
en Aŭstralio).

On p. 123 we omitted that Dr. F. Williams was elected A.E.A. President. Same page, last line, read "Gamble," not "Torr".

OBITUARY.—With deep regret we record the passing of Alexander Saar, 68, of West Australia. Holding the B.E.A. diploma, he conducted many courses, and for decades was a strong worker for the movement. He leaves a widow and four children, and an army of friends who loved and respected him.

Ni intencas eldoni ses numerojn en 1956. Do kvar sekvos antaŭ jarfino, se eble.

Pro mis-adreso, malfruis trafi min klubraporto Melb-a. Gi certe aperos!
—Red.

La Rondo

The Australian Esperanto Monthly

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.

Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

Vol. 12, N-ro 72.

MELBURNO.

Septembro, 1956

AL KORO VIA IRAS KRP' KASISTA!

Fariĝinte via enspezisto, mi entuziasme min turnis al la financa stato de nia asocio, sed, pro kelkaj ĝenoj, la plej grava el kiuj estis la bedaŭrinda neapero de la gazeto, mi devis pasi tra malfacila periodo ekde Canberra ĝis nun. Kiam mi fine ricevis la plenan liston de la membroj, frapis min terura fakto: post pli ol sep monatoj pagis la ĉijaran kotizon nur 44 el 168 membroj—mizera nombreto! Ho fratoj, ne restu surdaj al mia alvoko! Helpu min en mia dorna tasko. Venu al mi inundo da abonoj, per kio ni de nun povos pli regule eldoni la gazeton!—KEN LINTON.

DR. VERA SUMMERS

WAS present at the Esperanto Congress in Bologna, where she met in two conferences 81 teachers from different countries. French, Italian and Jugo-Slav teachers reported that they are conducting extra-mural classes in Esperanto. An Italian lady teacher successfully organised collective or inter-class correspondence, while other teachers admitted that their pupils prefer individual exchange of letters.

A French teacher reported that there are in France 839 members of the International League of Esperanto Teachers.

In England Dr. Summers visited a school in Manchester whose headmaster is an enthusiastic Esperantist.

In this school there are more than a thousand pupils, divided into groups according to intelligence. The most intelligent group has the right to learn either French or Esperanto; about half of them choose Esperanto. The middle group does not have the right to choose—they are compelled to learn Esperanto. Even the study of Esperanto is denied to the least intelligent group.

As a consequence some 600 pupils out of 1000 learn Esperanto. Five lessons a week for four years. When Mr. Williams, the headmaster, began to teach Esperanto several years ago, only one of his colleagues was an Esperantist. Now nine of them are teaching it, and one intends to learn it.

During the summer vacation Mr. Williams takes a party of 20-25 pupils abroad, using Esperanto. When Dr. Summers visited him he had just returned from Jugo-Slavia. In the vestibule of the school stands a fine exhibition of objects collected by means of Esperanto.

(From the list of schools given in "Esperanto," May, 1956, we assume that the school referred to is Auden-shaw C.E. School.—Editor.)

LA KINEJO KAJ LA PASTRO.

Ni komencis ruzloge emigi la patron doni al ni gravan permeson. En sabataj matenoj niaj ludkunuloj frekventis la urban kinejon. Ni ankoraŭ ne vidis tiun mirindaĵon, nome film-prezenton. Dum duono de la vintro ni petegis permeson iri tien, sed ricevis, el la Metodista Vivregularo, nur citaĵojn, kiuj pritraktis vantajn amuzojn. Fine, aktorino preferata de la geknaboj—Marguerite Clark—estis grandlitere reklamata en filmo, La Sep Cignoj. Tiun rakonton jam antaŭe legis al ni la patrino je la antaŭdorma horeto.

"Mi opinias, ke tia filmo estas sufiĉe konvena por la infanoj", diris la patrino. La patro iris en la bibliotekon, prenis de breto libron de fabeloj kaj tra legis la koncernen rakonton. Poste li telefonis al ia administristo de la kinejo:

"Ĉu la prezentata filmo estas bonmoralaj?" li demandis. Certigite, ke tiel estas, li aldonis: "Ĉu ĝi precize-fidele reprezentas la rakonton?" Ja vere.

La patro paŝis tien-reen dum longa tempo. Fine li sin turnis al ni, dirante: "Do bone, sed nur ĉi-foje".

Veninte al la kinejo, kiu estis plenpakita de infanoj, ni trovis la programon ŝanĝita. La fefilmo, pro transita prokrasto, ankoraŭ ne venis, kaj anstataŭ ĝin oni intencis prezenti filmon kun la ĉefaktorino Theda Bara. Ĝia ĉefa epizodo, kiom koncernen nian raporton al la patro, temis pri sekslogado al iu bankokasisto.

La patro estis ĉe la portiko, kiam ni ĝisvenis la hejmon. "Nu," li scivolis.

Arde ni priskribis la mirindaĵojn de la filmo kaj la implikaĵojn de la rakonto. sed kiam ni komencis priparoli la sekslogadon la patro ekfuri-

ozis. "Mi pensis, ke vi iris por vidi ferakonton!" li voĉe tamburis. Li pasigis la sekvantajn kvin minutojn telefone parolante al la administristo de la kinejo.

De tiam, dum iom longe, ni ne plu permesigis iri al kinejoj, tamen kun la paso de la tempo la patro moliĝis kaj akompanis nin al filmo, kies ĉefa stelo estis William S. Hart. La brutŝtelistoj pekis kaj rabis, drinkaĉis en homplenaĵ diboĉejoj. La patro min kubutpuŝis: "Jen vidu!" li gruntis. "Ĉu tio estas ekzemplo, kiun vi dezirus imiti?" Mi silentis.

Fine la senleĝuloj dimanĉmatene galopegis en la urbon, tiregis pastron el la predika seĝo, sidigis lin sur ĉevalon kaj celis peli lin trans la urblimon. La patro sidis streĉnerve kaj forgesis min kubutpuŝi. Vilĉjo Hart savis la pastron laĵ organizis urban-ojn en taĉmenton por restarigi ordon laŭ la leĝo. Edzino de brutbienisto ŝtormatakis la drinkejon kaj devigis sian edzon aliĝi al la defendantoj de la leĝo. Vidante bonmoran virinon batale defendanta la rajton deservi, la patro ridis—tiam okulsekvis la durevolveran heroon flugĉevalo atinganta la krimulojn. Fine ĉi tiuj estis enkarcerigitaj en la urba malliberejo. Hart postulis edziĝon kun la filino de la pastro—pri kio la patro gaje ekridis.

Tute dum nia hejmeniro mi atentis lian opinion. Ĉe la fronta pordo li diris ĝin: "Efektive, en tiu filmo estas bona moralinstruo", li asertis. Nenion pli mi aŭdis ĝis la sekvanta sabato. Post la tagmeza manĝo li invitis min denove al la kinejo. Responde al la demando brovlevo de nia patrino, li respondis: "Tio estos por mi sandona malstreĉo antaŭ ol mi verkos mian predikon por la dimanĉa diservo." ("One Foot in Heaven," Hartzell Spence.)

VORTARO AZORIN.

La Lingva Akademio jam oficiale kondamnis la Vortaron de Azorin. Aŭstria E-Revuo, post akra diskuto kun Waringhien, pike-kritike komentas: "Finfine la Akademio elvekiĝis el sia agonio, kaj oni nur povas esperi, ke ĝi daŭrigos sian agadon kaj prenos ankau la 'Suplementon' sub la lupeo."

ALEX SAAR.

Esperanto en Perth ricevis gravan baton en Junio, pro la morto de s-ro Alex. Saar. Nia malnova amiko venis el Estonujo, sed vojaĝis kiel maristo dum kelkaj jaroj. En 1910 li akceptis kiel hejmlando nian ŝtaton Okcidenta Australio, kaj 42 jarojn laboris en la Poŝta fako. Ses jarojn li estis oficisto ĉe la izola marborda telegrafstacio, Eucla, kaj estis la lasta ĉefoficisto tie, kiam oni infermis ĝin.

Efikis kiel frapaj fabeloj rakontoj. kiujn li diris pri solecaj veturoj en malnova automobilo tien kaj reen al Eucla, kaj ka strangaj rimedoj uzitaj kiam ĝi malfunkciis.

Lia ĉefa socia intereso estis E-o. En 1922 li ageme partoprenis kongreson en Perth kaj kelkfoje vizitis aliajn ŝtatojn por similaj aferoj. Li estis unu el la fortuloj de la E-Ligo en Okc. Aust., laborante kiel instruisto, prezidanto kaj direktoro de ekzamenoj.

Samtempe li estis ano kaj prez-o de la Asocio de Gepatroj kaj Civitanoj ĉe Mt. Lawley kaj ankaŭ fonda membro kaj vicprez-o de tiu Asocio ĉe Mt. Ingle.

Antau jaro, pli kaj pli da malsano devigis lin ĉesi socian laboron, kaj ĉe kunvenoj lia foresto estis multe rimarkita. Lia morto lasis grandan breĉon inter ni. Kun lia edzino kaj kvar infanoj ni kore kondolencas.

S-ro Saar havis amikon—S-ron Morton, kiu estis blindulo. S-ro Saar instruis E-on al li. Poste S-ro Morton iĝis fidela membro kaj ricevis specialan literaturon de E-ropo E-e skribita en Braille por blinduloj. Li ofte parolis pri la ĝojo, kiun tio portis al li.

La du amikoj restas ancorau kune, ĉar S-ro Morton mortis nur du-tri tagojn post S-ro Saar. Tial mankas al la O. A. Ligo du bonaj amikoj.

J. HAWKS (prez. O.A.E.L., Bacton House, Hay Street, Perth).

"REVUO de la Okcidentaŭstralia Esperanto Ligo". Krom raportoj pri agado, la numero enhavas Miraklo en Sablo (N. Brodie); Iuj Fazoj de Mia Vojaĝo (f-no A. Longson); Tutmonda Kalendaro (d-ro Einihovici); La Evoluo de la Libro (A. Saar). Ricevebla ĉe Okcidentaŭstralia E-Ligo, Bacton House, 723 Hay St., Perth.

Australia Kroniko

MELBURNO.—Inter la 7a kaj la 10a merkrede vidiĝas vigla agado en la Melburna Klubo. Nova kurso por lernantoj komenciĝis en Januaro sub gvidado de S-ro Drummond. La kurso komencita post Ekspozicio en Septembro daŭras sub gvidado de S-ino Koppel. Dum la dua horo troviĝas en ĉiu angulo rondeto, kiu legas kaj tradukas sub gvidado de S-ro Burstin, D-ro Williams kaj S-ino Koppel. Proksimume je la 9a, ĉiuj unuigas por kanti, helpate de la pianludado de nia fidela F-ino Amy Godfrey, aŭ kelkfoje de S-ro Rolding aŭ S-ino Hill, kaj, post tiu ĝuinda vigligo, progresintoj aŭ partoprenas aŭ aŭskultas interesan programon.

El la lastaj elstaras S-ro Linton—priskribo de Canberra; vizitanto Ursala Walde—pri Germanujo kaj vizito al Esperantistaj Junular-organizoj alilande; S-ro McKenzie—helpate de filo kun magnetofonregistraĵoj prelegis pri muziko; S-ro Potts el Novzelando—amuzaj monologoj; S-ro Koppel pri Superjaro kun historio pri kalendaroj; S-ro Burstin—Uzbekistanoj kaj sperto kun Ciganoj; S-ro Figgé—pri vojaĝoj survoje al Aŭstralio, serĉante fraton.

Bonvenaj gastoj de post Novjaro inkluzivis S-ron Potts survoje al Eŭropo el Novzelando kaj S-ro Figgé el Danujo. Por S-ro Potts kaj lia E-edzino, krom vespero en la Klubo, okazis speciala kunveno en la domo de Ges-roj Koppel, kiam ĉe-estis proks. 25 anoj por aŭskulti ties amuzajn verkojn. Gastigis lin ankaŭ S-ro Cohen per aŭtomobilekskurso al montaro. Ankaŭ bonvenaj estas Ges-roj Rolding, kiuj nun regule vizitadas la Klubejon. S-ro Rolding estas Dano, kiu ĵus revenis el Eŭropo, edziĝinte al ŝveda belulino.

RENDEVUO: Ĉe la Januara kunveno prelegis F-ino Cox pri perloj. Multflanka estis ŝia interesa informo pri tiuj belegaj juveloj. En Februaro, S-ro Hanks daŭrigis sian temon "Belaj vidataj sed ne rimarkataj," kaj per ĉiam novaj kaj belaj kliŝoj pruvis la temon vere neelĉerpebla. La Marta Rendevo okazis je Sankta Vendredo, do ne estis formala kunveno. Tamen ĉe-estis multaj por aŭskulti "Salutojn el Sydney" alpor-

titajn de S-ro Koppel sur magneto-fonbendo. S-ro Koppel aldonis rakonton pri impresoj kaj spertoj en Sydney. En Aprilo S-ino Hanks prelegis. Sia ĉiuflanka informo pri "Palmoj" finiĝis per amuza rakonto pri propra sperto kreskigi unu tian arbon.

PERTH.—The A.O.E.L. at the good-will annual exhibition in August displayed Esperanto literature and posters with good effect.

KONFERENCO JE MITTAGONG.

Lastan Majon ariĝis konference kelkaj sam-oj, inter ili S-roj Fulop, Gamble, Guelting, Latimer, Koppel, Matasin, Torr kaj F-inoj F. Smith kaj F. Whitlam. F-ino Ursula Walde per sia gastemeco faris la kunvenigon ebla por ni. Dankon al ŝi!

Oni konsentis al 15 decidoj, kiujn vi povas legi en la Kanbera Klub-bulteno. Petu ĝin de Mr. N. Gamble, 27 Froggatt St., Turner, Canberra.

Por la Novembra numero ni bezonas ĝisdatajn klubraportojn. Sendu ilin rekte al Box 2122T, Elizabeth Str., Melbourne.

KIOM DA VORTOJ HAVAS ESPERANTO? Ofta demando. En la j. 1887—920 radikoj. La Univ. Vortaro de 1894—2629. La 6 oficialaj aldonoj de la Akademio—1792 kaj 2 novaj sufiksoj, do 1794. Sekve, la oficialigitaj vortradikoj en la komuna uzado estas 4423. La Plena Vortaro dua eldono—6900; kun la jusa suplemento de 969 ĝi do jam enhavas 7869. Tiuj radikoj, per derivado, donas minimume 80,000 vortojn, kiuj respondas al vortoj uzataj en la naciaj literaturaj lingvoj kaj povas esprimi eĉ la plej delikatajn nuancojn de la penso.—G. Waringhien.

TRADUKANTOJ!

Inteligente tradukante, ni ne nur Esperanton pli bone posedas, sed ankaŭ la subtilaĵojn de la patra lingvo ni ĉiam pli kaj pli prikonscias, komprenas kaj kapablas logike esprimi en la internacia lingvo.

Ni tro facile supozas, ke, flue legante libron, ni ĝin perfekte komprenas. Certe ni ne paŭzas por serĉi la sencon le frazo, aŭ rimarki la dusencan de nebula esprimo. Penu

traduki tiun saman libron; post du-tri paragrafoj vi demandos al vi, kion la aŭtoro tiupaĝe volas diri?

Ofte mi trafas en tiun malfacilon, eĉ pri verkoj aŭ paragrafoj gazetaj, kiujn mi, pro nesufiĉa atento, unua-lege supozis tute klarsencaj. Vero estas, ke ni subkonscie trosupozas, ke ni rikoltis la tutan sencon; fakte ni gajnis nur suprajn impreson pri la tuto, sufiĉan por kontentigi nian flegman penson. Nur rapida kuro de la okuloj tra paragrafo aŭ paĝo povas sufiĉi por prezenti al ni pli-malpli klaran scenon aŭ situacion. Nia imago provizas la ceteron. Nur tiam, kiam ni parafrazas aŭ tradukas tiun paĝon, ni rimarkas neklarajn esprimajojn. Tio estas preskaŭ ĝenerala, kaj nepre okazas ĉe verkoj, kiuj traktas pri klarigado de agmotivoj, animaj statoj kaj interpersonaj sintenoj. Tamen ankaŭ ĉe relative simplaj vojaĝrakontoj kaj similaj oni baldaŭ gratos la kapon, cerbumante. Komprenoble tio okazas grandparte pro malkapablo de la aŭtoro sin klare komprenigi, sed ankaŭ mense malviglaj legantoj devas porti iom de la kulpo.

Ni klopodu legi analize, spirite penetrante, ĝis ni ricevos instinkton, kiu kapabligos al ni kvazaŭ senpere kompreni la penson de la aŭtoro malgraŭ lia mallerta skribesprimo.

Tradukanto estas "skribanta" interpretisto. Interpreti signifas klarigi, ekspliki, fideinde esprimi en tuj-komprenbla lingvaĵo. Suprajema, senatenta "pensanto" ne povas tion fari. Por perfektigi siajn tradukojn mond-famaj majstroj, kiel la geedzoj Maude, profunde studis la personaĵajn vivojn kaj animajn statojn de la homoj, kies verkojn ili revestis en aliaj lingvoj. Eĉ pli implikeca estas tio, ke "kiom da kapoj, tiom da konceptebloj" pri iu donita teksto. Tio evidentiĝis rimarkinde ĉe eseo de Lordo Cecil pri Hardy, en kiu sin trovas la vortoj: "he was hard but never bitter." Dek du tradukintoj donis diversajn interpretojn. Mi dubas pri la gusta dirvolo de la aŭtoro, sed konjektas iom jene: "he could on occasion be stubbornly angry but never brooded maliciously over an affair." Venas al mi la malesperiga penso, ke la nebulaĵaj vortoj de Lordo Cecil rajtas traduki kun memfido nur tre intima amiko de Thomas Hardy.

Nun penu traduki: "After life's fitful fever he sleeps well." "Fair Science frowned not on his humble birth, and Melancholy marked him for her own." "Nothing is unclean of itself." "Help thou mine unbelief." "I have not hastened from being a shepherd to follow thee" (Jer. 16/15). "John told Ben's son that he must help him" (ses sencoj).

Se vi fieras esti kaptinta iom el la stilbela de Zamenhof, penu pri: "What do you know that I don't?"; poste turnu vin al Ijob 15/9.

Persista tradukado de homo konstante informanta sin pri la kapabloj de mirinda ilo kiel Esp-o, kaj pri la komplikajoj de ekstreme subtila nacia lingvo kiel la Angla, signifas doni al si vere vastan edukadon en la kampoj de la homa penso kaj esprimado. Tia ekzercado de la cerba kaj spirita mehanismo povas nur rezultigi konsiderindan kreskon de la kapablo kompreni kaj interpreti la ideojn svarmantajn ankoraŭ obskure en nia granda literaturo.—F.R.B.

P.S.—"Science" en la tempo de la poeto Gray signifis "learning" (klero, scio); "Melancholy" ("medito").

LA PREĜO DE AVIADISTO.

Verkis ĝin Serĝento - Observisto Hugh R. Brodie; ĝi troviĝis inter liaj restaĵoj. Adresita al la studentoj de la Melburna Altlernejo, ĝi aperis en "The Unicorn," la lernejo revuo. Brodie perdiĝis post aeroperacio en Julio 1942. La poemo estis represita en "The Children's Newspaper" kaj en la Melburna "Herald" 16.12.42. Esperanta traduko de F. R. Banham:

Potenco ĉieesta, ĉiopova,
Al Vi mallonga estu mia preĝo:
Ne petas mi, en hor' batale prova,
Apartan ŝirmon ekster Via leĝo.

La ĉiam neŝangebla leĝ' eterna,
Al kiu obeadas la stelaro;
Neniam ĝi nuligiĝis nur por ŝirmi
La koron mian kontraŭ paf' mitrala.

La povon mortigadi mi ne petas.
Venketojn tiajn maltraste ŝatas mi,
Car malamikoj miaj ankaŭ estas
Amataj filoj. Patro, ja de Vi.

Sed preĝas mi: Je mia flanko restu
Dum tra ĉielo muĝos flama tondro;
En tiu tempo, ho Martiro-Kristo,
Al ankaŭ mi la vojon morti montru.

KORO — DOLORO.

En germanaj amokantoj
ĉiuspecaj gerimantoj,
gerimuloj, gerimistoj,
kaj precipe rimajistoj,
rimas je la vorto "Herz"
tre melankolie "Schmerz".

Plie franca la najbaro,
oferante sur altaro
de la muzoj, ofte trovas,
ke li plaĉi ilin povas,
se li en gajema "coeur"
sentas iom da "douleur".

Vidas angla sur insulo
eĉ densega tra nebulo
la pensema enloĝanto,
ke en vivo kaj en kanto
kuŝas la maldolĉa "smart"
tre proksime de la "heart".

Eĉ en bagatelo tia
estas do internacia
nia bela Esperanto.
Nu, ho kara samrimanto,
se vi havas ian "koron"
ne forgesu la "doloron".

K. Myslik, "Lingvo Internacia,"
Aprilo, 1907.

Recenzoj

"SINJORO TADEO" de Adam Mickiewicz; tradukita de A. Grabowski. Dua eld., fare de "Polonia", Varsovio. Ilust. 333 p. 1.5 dol. Enketu ĉe agentoj aŭ Polá E-Asocio, KoZIA 3, Warsaw.

La nova eldonajo estas forte impresa, tekste fidela kaj teknike artisma. Ĝi inde reprezentas la meriton de la granda poeto-patrioto kaj lia genia tradukinto. La okuloj de ambaŭ perlus per larmoj de plezuro, se ili rigardus trans la baron de l'morto ĉi juvelon de la literaturo.

La E-a traduko de "S.T." lingvaje enhavas en si ĉian latentan forton de la internacia lingvo; per la majstra mano de Kalocsay, kiu analoge disvolvigis la ĝermojn de esprimkapablo kaj penskonkretiĝo, ni ricevis mirinde riĉan konfirmon pri la fleksebleco de la lingvorimedoj E-aj, kiel

frue indikis tion Grabowski en la geniaj frazoj de sia tradukaĵo.

De post 1918, la jaro en kiu aperis la unua eldono E-a, multaj admirantoj artikolis pri la traduko: gijaj trafaj form-modifoj, la verve-vigla eksperimentismo. Kaj pri la poemo mem: ĝia senta elvokiveco de la idiliaj vort-bildoj—la rekreo de l'etosa aŭtenta, fonofidela, de la landaj regionoj tiel scene belaj.

Sciante la verkon dum 25 jaroj mi povus ankoraŭ aldoni al tiu fasko da studoj kaj laŭdoj; sed ekzemploj kaj citoj, for de la kunteksto kaj sen la spirita partopreno de la leganto, ne sufiĉas. Per tio pale efikus la frazo freŝa, la verso verva. Nenio alia ol funda familiariĝo kaj ama scianteo kun la epopeo mem levos leganton al tio, ke li mutos pro admiro antaŭ mirakloj de l'poeta potenco kaj vorta virtuo.

Dankas al la koncernatoj la E-istoj de hodiaŭ; dankos en jaroj venontaj ĉiu kulturama homo kiu sagace lernas Esperanton kaj deziros legi en ĝi la verkojn de eterna valoro.

La verko estis eldonita sub ŝtata egido, tial ĝi montras kreskantan refidiĝon al nia afero ĉe la aŭtoritataj centroj. Nepre menciu ĉi-entreprenon en artikoloj, paroladoj antaŭ la publiko.

Ornamas la dikan volumon ilustraĵoj de la fama pentristo E. M. Andrioli. Tion intencis aranĝi ankaŭ Grabowski en 1918, sed la kosto estis tiam troa. d'Angers kaj Norwid provizas la ceterajn bildojn.

La prezo estas mirinde malalta; jam ne parolante pri la spirita valoro, la teknika kaj materia prezentaĵo multe pli superas tiun modestan koston. Neniu studento deziranta penetri la genion de la lingvo mem, kaj neniu vere serioza serĉanto al la oro l'arto, povas rigardi sin plene armita, se li pro mendomanko restas sen la libro.

"AL ĈIU EGALĜ," de Salom Alejhem, tradukita de Maurice Salzmann. 37 Av. Henri Barbusse, Lyon-Villeurbanne, Rhone, France. 2 resp.k.

La trafakonta stilo de la novhebrea (jidiŝa) verkisto kristale lumas tra la traduko de nia samideano. kiu per ĉi-alegorio rememorigas nin pri la klasika "La Gimnazio", amata de ĉiu konanto de nia literaturo.

Estas plezuro ricevi legajon tiel agrable kaj plezure absorbatan. Oni fermas la libreton, sentante sin pli riĉa en senco filozofia, kaj sento admira.

Iuloke la tradukinto uzis arkaikajn formojn. 14. 16: domen (hejmen): Mi timas, ke oni ne komencu (Angle, "lest").

15: "Serĉemulo ja diras aliajn vortojn, sed li diras profetaĵojn". En ĉi-escepte stranga frazo mi baraktis. Supozinde: La veron oni iufoje parolas en formo de serĉo. Parolante serĉe, oni iufoje diras la veron. Serĉe dirite, cele pensite (Proverbaro 438).
—F. R. Banham.

PRI LA TRADUKARTO.

"Mi aprobas tiujn redaktorojn, kiuj laŭprincipe malakceptas tradukojn faritajn de E-istoj, kies gepatra lingvo ne estas tiu de la originala verko: se ili tiel agas nur pro persona intereso, pro motivoj de singardemo, pro la deziro havi ian garantian, ke la tradukinto bone posedas la lingvon de la tradukita verko, tiam ili estas pravaj. Sed se ili plie asertas, ke nur anglo povas bone traduki el la angla lingvo, ke tradukojn el la franca lingvo devas fari nur franclingvoj, k.t.p., tiam mi aprobo ĉesas! Ĉu vi kredas, ke traduko de angla verko, farita de anglo, kiu malbone traktadas eĉ sian propran lingvon (tiaj angloj ekzistas!), estas pli leginda, ol traduko de la sama verko, farita de franco, kiu posedas la anglan lingvon tiel perfekte kiel sian gepatran (tiaj francoj ja ekzistas!)? Almenaŭ jenan malbonaĵon povas havi (kaj ofte havas) E-aj tradukoj el nacia lingvo faritaj de la nacilingvulo mem, precipe se li posedas nenium alian fremdan lingvon: se E-o ne fariĝis al li kvazaŭ dua gepatra lingvo, kiun li scias uzi, skribe kaj buŝe, laŭ la vera Zamenhofa maniero, tiam mankos al lia verko la vera E-a spirito; simile al lernezerco de mia lernanto, ĝi restos spirite kaj forme nacia—iuspeca fi-Esperantaĵo laŭ sia ekstera formo, sed montranta en ĉiu linio sian nacian originon."—J. W. Eggleton, "Lingvo Internacia", Nov. 1911.

Li, kiu sentencis "Esperanto kapablas ĉion!", W. Auld, skribis en "Nederlanda E-isto": "Mi spertas en E-o. Mi pensas kaj sentas plej pro-

funde kaj plej nature en E-o. Sekve, se mi dezirus verki anglajn poemojn mi devus traduki miajn spertojn el E-o—kaj la poezio perdiĝus. Mi do poemas en E-o. Kelkaj sam-oj malkredos mian pretendon. Kial mi spertas Esp-e se mi vivas en angla-lingva medio? Ĉu mi scias certe? Tamen, miaj plej karaj amikoj estas ĉiuj tiaj homoj, kiuj spertas plej profunde en E-o, kaj kun ili mi ĉiam rilatas, ĉu parole ĉu cetera, per nia preferata lingvo. Ĉio plej kara al mi intime ligiĝas kun la internacia lingvo, kaj la angla fariĝis por mi 'fremda' lingvo, kaj la anglalingva medio estas medio en kiu mi vivas nur devige, ne volonte."

WORLD CLIPPINGS.

In 1955, 104 Esperanto publications were issued. From 1945 to 1955, 903 appeared. Over 2000 volumes and brochures were on view at the Exhibition of Esperanto in Montevideo.

Esperanto is taught in more than 140 schools throughout the world.

Esperantists gathered, some 150 at least, at the floral fete at Nantes last April. Eminent agronomist, Paul Neergaard (Dane), author of the detailed work on plant diseases, "Atakoj kontraŭ gardenplantoj," spoke in Esp-o on his subjects. The speech, translated into French for the benefit of half his audience, made a great impression.

"Scienca Revuo" is now designed for a wide field of readers in popular science and similar matter. A copy may be had from J. Muusses, Purmurend, Holland.

Thirty Esp-o prospectuses on touring, etc., were issued in 1955. We note the excellent one on Sardinia (Via Roma 56, Sassari, Sardinia); Oslo; Kopenhago, great wall-picture; Mercedes-Benz Auto Factory at Stuttgart sent guidebook to its museum (Daimler-Benz).

Visitors, stay at the Kastelo Gresillon, Bauge (M. et L., France, culture-home of the Esperantists. You are welcome! French may be learned there with Esp-o as the medium.

The Stockholm Peace Union awarded its Language Prize of 2000 Swedish crowns to Dr. Ivo Lapenna, secretary of the Universal Esperanto Assocn. Our colleague also came fifth in the "Man-of-the-Year" ballot conducted by the largest Finnish daily, Helsingin Sanomat.

Famous mathematician, Prof. Hukuhara Masuo, of the Uni. of Tokio, visited Italy and used Esp-o throughout, declaring that he was able, by its means, to exchange views clearly wherever he went abroad.

Mohammed Youssef, ship-builder, used Esp-o on his tour through Europe with outstanding success. He also discussed Islamic theology in that language with colleagues from Pakistan and Holland.

The new President of Brazil, Dr. Kubitschek, is a friend of Esp-o. He greeted 103 graduates of Esp-o classes in Belo Horizonte who were awarded their diplomas.

Danish journalist, G. N. Jepson, commissioned by his paper to get a story on the dykes and floods in Holland, wrote his articles on the basis of information he got through the use of Esperanto. He knew no Dutch, and Danish is not studied in Holland.

The telegram address of the Swiss Federated Railways in Bern is: Fer-vojo (railway in Esperanto).

The Necchi Sewing Machine Corp. in Pavia, Italy, calls its models—Supernova, Mira, Nova. Trade names in Esp-o are fairly frequent. Note the watch named "Movado," for example.

Said Lenin: "Esperanto is Proletarian Latin; I hope that it will, by its ideal simplicity, hasten the unity of the world's workers." (Heroldo de Esp-o, 1 May, 1956.)

The chemical firm, Bruno Vogelmann, in Crailsheim (Wurtemberg): "Our advt. in Heroldo de Esp-o and other Esp-o gazettes brought us dozens of letters, and we have, through this, been able to acquire representatives in other lands . . . three of our staff have decided to learn Esp-o and have taken lessons . . ."

Buddhists in Ceylon are using, with State aid, Esperanto in their research work throughout the world. Send air mail for information to C. Nyana-satta, Torrington Square, Colombo 7.

By Dec. 1955 the Univ. Esperanto Assocn. passed the 20,000 member mark, having gained some 5000 in 1955.

The Pax Christi Congress in Valladolid September, 1956, with Cardinal Feltrin (Paris) as president, has accepted Esperanto as official language. All documents of congress will appear in Esp-o.

The Ministry for Public Education in Guatemala has introduced Esperanto as an elective foreign language in its new plan, says "Informilo" of the Vienna State Esperanto Museum.

The Minister for External Affairs in Brazil, Jose C. de Macedo Soares, is an Esp-o pioneer.

There are some 5000 medical journals in the world, of which at least 2000 merit international study: 100-200 are of the very highest authority. Each section of the science of medicine is represented by from 10 to 30 specialist gazettes of universal interest to those in limited fields of inquiry.

Some journals give resumes of the chief articles. These resumes are in different languages according to the countries of origin. Two use Esperanto as resume-medium—Acta Orthopaedica Belgica and Journal de Medicine de Lyon. The all-Esperanto Medical Revuo can be obtained from Prof. Masao Suzuki, Fiziologia Instituto, Tiba, Japan.

The "stelo" is Esperanto currency and worth 7½d. in Australia and 6d. in Britain. It is very useful in reckoning costs of books. The U.E.A., by the way, counts a reply coupon as worth a stelo, but the r.p. costs us here one shilling, not 7½d., at the P.O.

The World Esperanto Congress for 1957 will take place in Marseilles.

"POR" POST "-EBLA."

Iuj verkistoj uzas "por" post vortoj kun -ebla, ekz., "tio estas ne komprenebla por mi"; ". . . farebla por mi". Sed ĉu tio estas logika? Eble jes, se oni forgesas la vortelementojn kaj akceptas la kunmetitan kiel memstaran ideon. Tia akcepto ŝajnas ne propra en Esp-o. Vorto konstruita kun -ebl al mi signifas "kiu povas esti -ata": Komprenebla—kiu povas esti komprenata. Se pro tio mi ne eraras, la ĝusta prepozicio estus 'de'."—C.C.C.

SUBSCRIPTIONS. — Dankon al vi! Messrs. V. P. Rolding, S. Fulop, Mrs. J. Torr, Miss W. Addis, 12/6; Mr. C. P. Hehir, £3/14/-; Mrs. D. Wishart, 25/-.

We are especially grateful to those who have so generously given extra help here. We shall do our best to requit their generosity.

MR. JACK COUCHE.

With deep regret we learn of the death of Mr. Jack Couche, at his home, 78 Cascades Road, Hobart, on 24th July. We hope that someone may send us a fitting memoir of our late friend and fellow worker, for publication in the gazette.

TEST YOUR SKILL.

How does one's complexion look in Esperanto when in English it is described as (a) pallid; (b) sallow; (c) sanguine; (d) florid; (e) livid; (f) jaundiced; (g) hectic; (h) mottled?

And one's expression—(a) arch; (b) bland; (c) vacuous; (d) elfin; (e) supercilious?

Make clear in Esperanto what you think the writer of the following is driving at?—"I am not writing to him because I am angry with him." "I am in an unenviable position, being charged with making invidious distinctions."

A grupo in U.S.A. constantly uses the form "the interlanguage" (i.e., "la interlingvo") when speaking of Esperanto. I protest strongly. Esperanto is The International Language. It is no more "interlingva" than any other language. — J. W. Leslie in "Heroldo de Esperanto".

La Rondo

The Australian Esperanto Monthly

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.

Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

Vol. 12, N-ro 73.

MELBURNO.

Okt. - Nov., 1956

ESPERANTO AS A LITERARY LANGUAGE

Big Names Banded in Professorial Polemic.

Some years ago Professor Lodewyckx, of Melbourne, corresponded with us on the fitness of Esperanto as a literary medium. We quoted Stefan Zweig, Ossendowski, Ludwig Renn, Baudouin, Babits and Selma Lagerlof, who had warmly affirmed the success of Esperanto in coping with the higher literature. The professor, whose scepticism covered not only Esperanto but also any planned language, countered with a passage from Prof. A. Meillet's "Languages in the New Europe" (2nd edn.) in which doubt was cast on these claims. We commented thus:—

"We agree that the quoting of well-known names in favor or disfavor of Esperanto is more or less unprofitable and converts but few of those already convinced one way or the other. We would, however, mention as against Meillet the name of the great Jespersen, who, though not stressing the literary potentialities of his Novial, nevertheless published in it work of a distinctly literary character. It is hard to believe that such a penetrating, philosophic mind as his could apply itself to the task of inventing a language without trying to incorporate in it those elements that would give it the power to become a literary tongue. If, then Jespersen held the belief that an artificial language could become a finely discriminating literary instrument, we have one great philologist against another.

In any case, Meillet's general approval of Esperanto should be cited: "The possibility of establishing an artificial language easy to learn and understand, and of such being practicable, has been demonstrated. All theoretical discussion is vain; Esperanto functions."

We have seldom seen a thoughtful study written to disprove the fitness of Esperanto for literature. Such an article should take the form of a detailed analysis of a given translation in Esperanto, compared faithfully with the original text. Such, of course, postulates an intimate knowledge not only of Esperanto grammar, but of Esperanto semantics, of the 'literary' (we quote the word to avoid the imputation of begging the question) evolution and the tradition of the language. We find general, vague denials a-plenty, but no serious attempt to demonstrate any truth in the assertion.

On the other hand there are many finely wrought studies on the flexibility of Esperanto in translation. Prof. Collinson, several clergymen on the Hebrew Bible, and Prof. G. Waringhien (Lille Uni.) in his "L'Esperanto et La Stylistique" and "A.B.C. d'Esperanto a l'Usage de Ceux qui Aiment les Lettres" have shown a careful treatment of the question.

The lack of fair-minded work of this kind, unfavorable to Esperanto,

is the more remarkable when one considers the wide field offered to such criticism by the low standard of some of our Esperanto translations. The fault here lies with those Esperantists who, possessing little literary sense, and in many cases having but an incomplete mastery of their media, have undertaken work beyond their power or comprehension. There is, however, work both in prose and poetry that fully merits the attention of those interested in the relation of international language to literature.

Not a few of those who deny to Esperanto a literary future grant that it is well fitted for science, travel and commerce. It is well that no risk be run of alienating this body of opinion by a stressing of its literary features deemed by them to be excessive.

One of the greatest glories of Esperanto's translated literature is the "Inferno" of Dante, translated by Kalocsay. With confidence we enter it in any critical comparison with the best national renderings. Compare it with, e.g., the translation of Dorothy Sayers:—

Je l'voomez' de nia vivo tera
Mi trovis min en arbareg' obskura,
ĉar perdiĝinta estis vojo vera.

(Canto 1, 1/3.)

Midway this way of life we're bound
upon,
I woke to find myself in a dark
wood,
Where the right road was wholly
lost and gone.

La svenan dormon tondro romp
brue,
tiel ke mi vekite min ekmovis,
kiel persono alarmita skue.

(Canto 4, 1/3.)

A heavy peal of thunder came to
waken me
Out of the stunning slumber that
had bound me,
Startling me up as though rude
hands had shaken me.

In the professor's last letter he wrote what for us is most satisfactory, as it grants our chief point:—

"I do not deny the possibility of Esperanto or any other artificial language developing into a literary language. It only requires men of great

literary genius using such a language for original production."

We believe that when our critics bring themselves to explore, with a sympathetic understanding and full knowledge of Esperanto, its language and literature, they will come to the conclusion, as we have, that in the best of the work already done there are signs of the presence of that genius grudgingly regarded by Prof. Lodewyckx as yet waiting to be born.

—F.R.B.

World Clippings

In AUCKLAND, New Zealand's largest city, an Esperanto Road was opened by Mr. F. L. Gotz, M.H.R.

* * *

In RIO DE JANEIRO the Esperanto Co-operative has its own printery.

At STRATFORD-ON-AVON the Shakespeare Memorial Library held an exhibition of Esperanto translations of the poet's works. Twelve of them have been published, and two, Othello and The Taming of the Shrew, are in mss.

* * *

RAILWAYS: The Austrian Railroad Administration pays the cost of printing and mailing the Bulletin of the Austrian section of the International Federation of Railroad Employes, and plans issue of a folder in Esperanto. Train conductors may wear a special badge as do those speaking other languages. All personnel have right to wear the Esperanto Green Star on their uniforms, a privilege granted in 1928 but lost under the Nazis.

The Belgian Railroad Administration has issued two staff circulars encouraging employes to learn Esperanto, and authorising Esperanto matter on all bulletin boards for personnel.

* * *

In NEW YORK last April the Modern Languages Assn. held a conference on "Constructed Languages." Much information on Esperanto was there presented, says "American Esp. Magazine", which we regret gave no report of the proceedings.

SCIENCA REVUO (Nov. 1955) lists 85 science periodicals that have published summaries in Esperanto. 49 of them were in Japan. The Journal de Medicine de Lyon quotes Dr. Roux, director of the Pasteur Institute in Paris, and Prof. M. Leblanc, of the Academy of Sciences, on the value of Esperanto for international scientific co-operation. This journal also prints French summaries of articles from "Medicina Revuo," an all-Esperanto medical journal printed in Japan.

The "Journal of Yokohama" Municipal University filled its December number with a research paper by Prof. K. Tsumura on diatoms in parallel columns—English and Esperanto.

EPITAPH.

Translation of "Epitafo" (La Rondo, p. 133). Its author died Sept. 18.
 O passer-by, if you should read
 My name upon this stone,
 With downcast eyes, send forth no prayer
 Toward the heavenly throne.

But rather some small kindness do
 Whene'er one's need you see.
 Such acts are prayers: new pearls to join
 Those on my rosary.

A.E.A. BOOK - SERVICE.

Order your Esperanto-Books from your nearest Book-Agent:

Victoria and Tasmania: Mrs. O. Glenie, 90 William St., St. Kilda, Vic.

South Australia: Miss W. Addis, 25 Greville Ave., Flinders Park, S.A.

Western Australia: Miss E. Chandler, 5 Todd Ave., Como, W.A.

Canberra: Mr. S. Fulop, 6/10th St., Narrabundah, Canberra, A.C.T.
 N.S.W.: Miss F. Smith, 50 Fitzroy St., Milson's Point, N.S.W.

Queensland: Mr. N. G. Mills, Cnr. Durack St. and Ipswich Rd., Moorooka, Brisbane.

All these agents carry a good supply of the most popular Esperanto-books. Special books can be ordered from overseas by contacting our Chief Book Agent: Mr. Mills in Brisbane.

Melburna Kroniko

Arangi interesan programon por la merkredaj klubvesperoj estas ciam malfacila tasko, ĉar kelkaj el la plej spertaj s-anoj preskaŭ neniam vizitas la klubon. Tamen, varia programo estis prezentita dum la lastaj 3 monatoj.

En Junio f-ino Glennis Calwell parolis pri Esperanto ĉe Radio-Stacio 3DB. Ŝia parolado estis registrita sur sonbendo kaj denove prezentita dum la grupvespero. F-ino Calwell aldonis interesajn faktojn pri la venontaj Olimpiaj Ludoj. Alia interesa prelego estis tiu de f-ino Amy Godfrey, kiu legis elĉerpajojn el malnovaj numeroj de la "London Times" kiuj multe amuzis la ĉeestantojn.

En Julio la klubo ree bonvenigis s-ron Koppel, kiu post 3-monata laboro en Sidnejo revenis al Melburno. Je 4/7 li priskribis vojaĝon al Kvinslando kaj sian viziton ĉe Brisbanaj s-anoj. S-ro Cohen interese priskribis la longjaran batalon de la japano Mikimoto por evoluigi perlojn kaj la finan venkon de ĉi-tiu geniulo (11/7). La Esperanto-Filmo pri "Danlando" prezentigis je 18/7 kaj je la 25/7 s-ino Hill parolis pri la insulo Nova Gvineo.

Ciam interesaj estas la prelegoj de s-ro E. Hanks. Je la 1/8 li montris al ni belajn, memfaritajn lumbildojn pri diversaj arboj kaj birdoj de Aŭstralio. Aŭdi la voĉojn de s-anoj el malproksimaj landoj, tio certe estas unika okazintaĵo. La Esperanto-Societo "Harmonio" el Vieno (Aŭstrio), kiun fondis s-ano Herbert Koppel antaŭ 20 jaroj, sendis tuthoran programon sur sonbendo. Salutoj de eminentaj s-anoj de la aŭstria E-movado sekvis belan muzikon, E-poemoj sekvis priskribojn pri la nuntempa Vieno (15/8). S-ro E. McKenzie parolis (21/8) pri grandaj kaj malgrandaj mensogoj kaj je la 29/8 ni ĝuis la belajn lumbildojn de s-ro Matasin (Sydney) pri la Perta kaj Canberra E-kongresoj, prezentitaj de s-ano Koppel.

En la junio kunveno de la RENDEVUO s-ino Hintze parolis pri Lanti, fondinto de SAT, kaj f-ino Calwell legis interesajn elĉerpajojn el la E-gazetaro. Post longa silento, s-ro Fridenbergs parolis en la julia kunveno pri siaj 7 jaroj en Aŭstralio.

Treege interesan prelegon donis nia rusa s-ano Stepanow, kiu parolis pri la IDO-krizo kaj informis nin pri la nuntempa stato de la (ankoraŭ ekzistanta) Ido-movado.

La klubo bonvenigis novan enmigrinton, s-anon Hermann, el Stuttgart (Germanujo).

ADELAIDE. — Our circle meets every second week in private houses, owing to difficulty in obtaining a central place. Mr. Syd. Grant, of Port Lincoln, visited us in July, and in September Dr. A. Einihovici, who was attending a medical congress. Through lack of opportunity we could make only short contact with our Perth friend before he left for home. We hope to participate in the translation work of the Canberra Club.—H. W. Fidge.

Ni bedaŭras ke ni ne ricevis raportojn el Brisbane, Sydney, Canberra, aŭ Perth. Ŝajnas ke samcelano Leereveld fondis kursgrupon en la kvakera lernejo en Hobart, sed oficialan raporton ni ĝis nun ne ricevis. Ni esperas ke la klubsekretarioj superŝutos nin per raportoj por la Decembra numero. Sendu ĝis Nov. 8.

PLENA GRAMATIKO.

La tria kompletigita eldono de tiu granda verko aperos baldaŭ. Detaloj sekvas. Ambaŭ ĝiaj eldonoj elĉerpigis rapide, kaj novaj adeptoj ĝojos havi eblecon ricevi klaran respondon al ĉiaj lingvaj demandoj. La Tria estos en tri volumoj.

La Itala estas la dua lingvo en Aŭstralio, laŭ efektivaj uzantoj de tiu idiomu. Vocabulario Italiano-Esperanto aperos po kajeroj da 128 paĝoj, kaj ampleksos 500 paĝojn. Ni ricevis specimenaĵojn paĝojn de P. Pace, Casella Postale 1175, Milan, kiu donus provizorajn informojn pri ambaŭ verkoj.

LORDO CECIL PRI HARDY. (El "Hardy the Novelist")

La Kristanaj virtoj—fideleco, kompato, humileco—estis por li la plej admirindaj; kaj tiu sama verameco, kiu devigis lin akcepti la nigre malesperan alrigardon al la vivo, rekonitan de lia racio kiel veran, ankaŭ tenis lin fidela al tio, kion lia instinkto kredigis al li esti la plej alta idealo de la virteco.

Povas esti, ke tiuj virtoj neniel valoras en la universo; povas esti, ke ili naskiĝis nur por penadi kaj suferi kaj trafi en malvenkon. Verdire, kontraŭ al tio, kion diras S-ro Eliot, S-ro Chesterton kaj aliaj profesiaj defendantoj de la ortodokseco, Hardy estis unu el la plej Kristanaj animoj. La idealo de homa karaktero, kiun li vortbilde prezentas al ni, estas specife Kristana: nome, la idealo de la Kristanaj Benvortoj—humileco, kompatemo, korpureco kaj pacigemo; ĝia plej alta virto estas amo sinofera.

Eĉ ja la pesimismo mem de Hardy estis ebla nur por homo nedisigeble ligita al Kristanaj kriterioj de la valoro. Kristanaj pensuloj instruas, ke ekzistas nur unu alternativo al Kristaneco—nome, la pesimismo, kaj ke, se Kristanismo ne estas vera, la homa vivo estas afero tragika. Hardy konsentis kun tio. Li trovis ne ebla, kredi en la Kristana espero. Povas esti, ke li estis malprava en tio. Mi pensas, ke li malpravus. Tamen, oni ne povas alie fari ol lin respekti pro la honesto, kiu devigis lin akcepti filozofion tiel malbelan pro la plej profundaj instinktoj de lia koro. Ankoraŭ pli oni devas honori lin pro tiu alteco de la animo, kiu ebligis al li konservi la Kristanan temperamenton sen la helpo de la Kristana konsolo. Li konceptis la vivon kiel malican kaj maldolĉan, sed li mem neniam estis malica aŭ maldolĉa—krom pro tre maloftaj impulsoj de kolerigo.

La brila flamo de lia homamo flagris ankoraŭ ĉiam pli alte, ĝuste pro la absoluta kaj senfina nigreco de la universo, en kiu ĝi estis la sola lumradio.

PIPAJ PAROLOJ.

Kabe iam diris: speciale la Esperantistoj lernu Esperanton.

Donald Broadribb (en la Hispana "Boletino"): Zamenhof estis ja vere la inventinto de Esperanto, sed ne ĝia plej lerta uzanto. . . .

"Dia Regno": "La homoj (en la Babeltempo) vivis en la timo, ke ili estas distrotaj (dissemotaj)?—Red. L.R.) en ĉiujn landojn. . . ."

Leslie Govier en "Esperanto": "Verkoj ne plu aĉeteblaj—verkoj, kiuj nur kuŝas sur bretoj de la maljuna generacio, aŭ kiujn oni devas elfosi el arkivo estas nur pompa blufado kaj blago.

Tiujn verkojn oni povos rigardi kiel nian literaturon nur tiam, kiam ili reeniros la vivon en novaj eldonoj."

"CHILDREN OF THE WORLD."

HEIBONSYA Publishing House, Yanbanto, Tiyodaku, Tokio, which is using Esperanto as added medium in its quest for world cover, seeks AUSTRALIAN co-operation. It asks for selected drawings and compositions by children revealing subjective social outlook on domestic and social life generally. In July last letters were sent to all Esperantists in Australia and New Zealand whose names are in the year books of U.E.A. and S.A.T. but no reply from Australians had been received.

Designed for Japanese pupils, seven volumes of 200 pages have appeared in Japanese:—French, British-Irish, Chinese-Korean, Central European, North European, Soviet Union and South-East Asia.

The whole world will eventually be represented, and any language is accepted, but translations should be given in either Esperanto, English or French, where these languages are not primarily used.

Please send material in English to the address above. The closing date for Australia had been fixed for Nov., 1956, and the printing date, April, 1957, but due to special causes here they may be extended. Helpers receive the gazette "La Infanoj de la Mondo" and each contributor to the book will receive the volume concerned.

If you can aid the enterprise please advise by air the address immediately. Much depends on the co-operation of Esperantists in this concern.

GENIULO FRUMATURA.

A. E. Styler (mortis 1928) verkis "En La Montoj" en 1913 post dumonata studo de nia lingvo, per kiu li gajnis ĉefpremion en konkurso de la B.E.A. En 1914 aperis la 131 kantoj de In Memoriam (Tennyson). D-ro J. Pollen (tiam prezidanto de la B.E.A.) skribis: "Nur tre malofte mi legis kun pli profunda plezuro iun tradukaĵon . . ."

Tamen, tiu libro, juvelo de nia literaturo, ankaŭ ĝi inter tiom da aliaj, jam de multe jaroj ne plu estas aĉetebla.

Recenzoj

KONTRALTE. Poemaro de Marjorie Boulton. Eldonis Stafeto, Kanariaj Insuloj. 286 p. Pŕezo 15/6 Aust. ĉe niaj agentoj.

La plej impresa poemkompilo en Esp-o iam ajn farita de virino. Laŭ kvanto kaj kvalito tiu volumo estas efektive miriga. Post nur kelkajara intimigado kun Esp-o, fekundas inter ni riĉe dotita animo, kiu kapablas el-torni fluan, trafespriman poezion, komparindan eĉ kun la majstra.

En sia patra lingvo M.B. estas virino klera kaj kulturita en sia fako. Kelkaj verkoj de elstara valoro portas ŝian nomon de aŭtoro. Nun, ver-vigite de la genio de Esp-o, ŝi uzas ĝin kiel medion por vesti la pensojn de menso en kiu fermentas ideoj jen noble edifaj, jen sarkasme sociprotestaj, jen aparte rilataj al la pulsoj de l'virina psiko, jen gaje humuraj kiam ŝi penike prituŝas la personecojn de diversaj samideanoj.

La 28 Sonetoj el Virina Kolegio, dediĉitaj al ŝiaj studentinoj, montras interalie ŝian senton de nesufiĉeco antaŭ la gravega vivlaboro, muldi la mjensojn kaj animojn de la knabinoj. Finstrofe ŝi vokas ilin al reciproka helpo:—

Ne fanfaronas mi pri vasta
sci'

Ni nin klerigas kune, vi kaj
mi.

El ĉiu verso spiras la saĝa pedagogo, la molkora homino.

En la Taglibro de Amo ŝi kuraĝe alpaŝas por provi miraklon. Nome, ŝi volas fari la preskaŭ-neeblon, penante doni poezion konturon kaj perfektan plenan de esprimo al la misteroj de l'erotiko. Ĉu aŭ ne ŝi sukcesis inter la limoj de l'belgusto, tion ni ne decidus per principoj ĝenerale validaj. Tiaj ne ekzistas, ĉar la gradon de aprobo difinas la individua leganto laŭ la forto aŭ neforto de liaj moralaj inhibicioj. En la moderna mondo, kiam la seksa psikologio estas studata jam en ekleziaj rondoj, ni ne dubas, ke troviĝus simpatiaj pastroj, kiuj, kune kun literatoj ne specife religiaj, aprobus la lingvaĵon de ŝi elektitan por venki la taskon.

Antaŭparole W. Auld rimarkas, ke la mondo ankoraŭ atendas sian unuan vere grandiozan poetinon. Li mencias ses nomojn, kiuj atingis moderan renomon. Mi aldonas du: Elizabeth Barrett Browning, Emily Bronte.

Inter la multaj, kiuj certe volas legi la verkon, sendube troviĝas ankaŭ la knabinoj pri kiuj ŝi tiel ĉarme kaj tenere formis tiom da memorindaj versoj. Ni salutas nian Princon de l'Parnaso kaj senrezerve rekomendas ĉi-kolekton de unike intimaj pensoj, genie generitaj kaj plastike pentritaj.

MILITISTA VORTARETO. Kvinlingva. Eld. Franca Komitato por informo pri Esperanto. Havebla ĉe U.E.A., 34 rue de Chabrol, Paris 10. Prezo ĉ. 2/6.

Kompilis fakuloj en ses landoj. En 21 sekcioj la libreto donas formekvivalentojn—ne difinojn—de 700 vortoj armeaj en E-o, Angla, Franca, Germana, Itala. La unua militista vortaro—de Bayol—publikigis en 1906, France-E-e. En 1904 Durrant kompilis sian tut-Esp-an armean vortaron. La nuna, en neta formato, estas tre utila precipe pro la kvinlingva komparo.

“Roto”, oficiala, iel ne trovas lokon apud ploton, grupo, kompanio, taĉmento.

NICA LITERATURA REVUO (Mart-Apr.). 32-40 p.; 10/6 Aŭst. por ses numeroj jare. Agentoj aŭ B.E.A.

Riĉenhava, netaspekta, al kiu kontribuas la korifeoj de l'humoro kaj kulturo. Kalocsay ditirambas pri Marjorie Boulton, Rossetti pri Kalocsay; Waringhien analizas la vivon kaj verkon de Mallarme, Schwartz ridige rakontas en verva stilo, Nurek penas traduki “It's just one of those things”, pri kio Rossetti donas saĝan konsilon kune kun lerta tradukformo. Tiu revestas novelon de Jack London: Pumpr recenzas poemaron de Thorsen kaj, kiel ĉiame, lia takso estas trafe informdona. Ĉio cetera estas ankaŭ tra leginda.

“TRE MIRIGAJ AVENTUROJ DE TARTARIN DE TARASKONO”, de A. Daudet. Tradukis Jean Delor kaj Paul de Brun. Eldonis Heroldo de E-o. 192 p. Prezo

15/- Aŭst., ĉe agentoj.

Ankoraŭ oni ne povas diri, ke la Franca literaturo estas inde reprezentita en E-o. Vidu: “Franca E-isto”, Jan. 1936; “La Internacia Lingvo”, de Lapenna. Ĉi tiu verko, honeste kaj impres farita, helpas en modesta iomo forigi tiun riproĉon. Interese estas, ke antaŭ pluraj jaroj antaŭis ĝin alia verko de Daudet—Leteroj el Mia Muelejo—tradukita de Japano!

“Tartarin” havas apartan logon por homoj kun sentemeco al gaja, facil-kora kaj fantazie-petola humoro, kun larĝa simpatio al la pli-malpli groteskaj devojiĝoj de cetero sana, honeste stulta homa karaktero. La ĉefguro estas simplacerba sudfranco, en kies malkuraĝan koron venas la stranga ideo ĉasi leonojn. Kiel tiu impulso ĝermis en li ĉe klubbabilo, la amuza priskribo de lia forveturo eksterlanden, kaj liaj aventuroj en Alĝerio inter bestoj kaj virinoj, ĝis lia reveno hejmen akompanate de kamelo . . . pri tio vi mem legu.

Li estas amalgamo, kunfandaĵo de ia Don Kihoto kaj Sanĉo Panzo—iujfoje malavara, riskeme sindonema, grandiozanima; aliffoje, mistere retenata de ia spirito de sinsavemo, memintereso kaj timo antaŭ liaimage embuskanta mondo, ĉiam celanta al lia malutilo.

La verko estas saturita de aparte Franceca sprito kaj spirito, kaj la tradukintoj genie sukcesis transdoni por la mondo tiun densodoran parfumon, kiu restas en-ece en la verva esprimformo de la majstra originalo. Nur tie-tie ili ŝajnas pasi trans la limon de frazuzindeco, tro fidante al la komprenipovo de legantoj ne sciantaj la nuancriĉon de la Daudet'a plummagiko. Tamen tiaj dubindaĵoj (ekz., 184: marmeladon da leonoj...) neniel forprenas de la facila komprenebleco de la verko entute, kaj la zorge kompilita listo de klarigoj estas modelo por ĉiu tradukanto.—F.R.B.

SUBSCRIPTIONS:—Rev. C. C. Cowling, Rev. W. V. Rymer, Messrs. S. Ling. W. T. Cowley, E. Costa, S. H. Grant, J. Dwyer, Mrs. M. I. Humphries, 12/6. Thanks to all, especially to Melbourne Esperanto Club, £8/6/6; Mr. Allan Turner, £5; Miss F. Kemp, £2; Mrs. F. Rawson, £1/1/-; Messrs. Frank Halls and I. T. Maddern, £1.

KIAM?

"La Japanoj estas la Germanoj de l'Oriento." Certe tio validas, kiom koncernas la Esperantologion. En La Revuo Orienta, p. 44, Feb. 55, aŭtoro prezentas interesan karakterizojn de la korelativa tabelo—nome, ke "en la Pleŭta Vortaro ne troviĝas por KIAM uzo kiel nereкта demanda vorto (en subordita frazo), nek mi povis trovi tian en Zamenhofaj verkoj . . ."

Ekzemple, oni diras:

Mi montris al li, kie kuŝas la pupo.

Mi scias, kies kulpo ĝi estas. k.t.p.

Sed NE diras: Mi metis la demandon al li, kiam li venis (en la ĉambro).

Ĉar sciu, ke tiu frazo estas ambigua. Ĝi povas signifi (1) Mi metis al li demandon (pri iu afero; eble, ĉu li intencas viziti kinejon), tuj kiam li venis . . . aŭ (2) Mi demandis al li, pri tio, nome, je kiu tempo (= kiam) li venis (en la ĉ.).

Kion diras niaj lingvemuloj pri tio?

DUM KAJ ĜIS.

Nur du prepozicioj, dum kaj ĝis, estas ĝenerale akceptitaj ankaŭ kiel konjunkcioj; sed ekzistas tendenco ilin kombini kun "ke" aŭ "kiam" (dum ke, dum kiam, ĝis kiam). Jen ekzemploj:

"Mi atendis dum kiam li skribis leteron." "La riĉuloj dibocas, dum ke la malriĉuloj malsatas."

Karl Minor asertas ilin puraj prepozicioj; se uzate konjunkcie ili sekviĝu de "kiam" aŭ "ke".

William Bailey, L.A., ne konsentis. Li nomis la "kiam" superflua. Kabe uzis ĝin ĉe La Faraono, vol. ii, p. 107, 126, 212. Unu sola ekzemplo ĉe Zam. de la pleonasma "kiam" staras ĉe Nombroj xiv, 33, sed ni ne povas esti certaj, ke Zam. efektive ĝin skribis. La Biblia Komitato ne povis ricevi la Varsovia manuskripto de tiuj partoj de la Biblio, kiujn eldonis Hachette. Kie "ĝis kiam" estas imitebla, tio estas en demanda frazo, kia "How long . . .?" Ijob xix, 2: "Ĝis kiam (how long) vi afliktados mian animon?" Psa. xiii, 1: "Ĝis kiam . . . vi tute forgesos pri mi?" Vidu ankaŭ Psa. lxxxii, 2; Josuo xviii, 3; Eliro x, 3; Nombroj xiv, 11, 27.

Sed por montri simplan futuron Zam. uzis "ĝis" konjunkcie, kiel ekzemple: "ĝis ili ĉesos paroli"; "ĝis mi venos".—F.R.B.

"Mi petas pri la vortoj, 'I want'. Ĉu oni diras Esperante 'Mi volas' aŭ 'Mi deziras'? Laŭ mia opinio saĝe estus diri: 'Mi volas eliri, labori, manĝi. Mi deziras domon, aŭton'. Alivorte 'Mi deziras' signifas konkretan ideon; 'Mi volas' signifas abstraktan ideon."—Ho-bo.

Mi direktas vian atenton al difinoj en la Plena Vortaro, Millidge kaj al uzado ke konataj verkistoj. Per konkordanco de la Angla Biblio, serĉu en la Esp-a Biblio kiel tradukigis la multaj "wish", "will", "desire" (verboj). Mi donas malsupre sugestojn, sed bedaŭrinde ili ne fariĝis ĝeneralaĵoj:

"Voli" uziĝu laŭ senco "to will", "to be willing", eĉ kontraŭ propra intereso aŭ plezuro fizika, mensa, kòra. Ekzemple:

Mi volas kapitulacii.

Mi volas (tie. konsentas, cedas) doni al vi la monon, sed mi ne deziras ĝin doni.

Mi petadis lin lavi la plankon, ĝis fine li malbonvole volis fari tion.

Por eviti punon mi volas, sed ne deziras, pagi nejustan imposton.

"Se vi volas, vi povas min purigi."

"Mi volas; estu purigita." Mateo 8, 2/3.

Sed la baza nocio en "deziri" estas plezuro, ĝuo, kontentigo, faciligo fizika, mensa aŭ anima. Homo "deziras" peti pardonon; grati la kapon, kisi negrion, ricevi aŭton, sukeraĵon, laŭdon, amikecon, morton.

La tradukintoj de la Esp-a Nova Testamento, uzante jen "deziri" jen "voli" por vesti la nocion en la Angla "desire", miakrede ne ĉiam sekvas la supran gvidlinion.—F.R.B.

TERO SEN ĈIELO.

Usono infano aŭdis pri la atombombo kaj demandis la patrinon: "De kie do la bombo venas?" Sciiĝinte, ke ĝi falis el la ĉielo, la etulo diris: "Do, panjo, ni iru al senĉiela lando!" Saĝo el suĉula buŝo. Ho se nur la nacioj kunlaborus al tio, ke ni vivu en landoj SEN ĉielo el kiuj falas tiaj diablajoj.

LA LIBERVOLA CIVILA HELPSERVO INTERNACIA en multaj landoj dediĉas sin al riparado de akcidentoj kaj katastrofoj, ne domaĝante la proprajn havon kaj energion. Jen unu el la plej brilaj lumoj en nia nuntempa moderna socio—homoj kiuj, el pura altruismo, faras la ekstremon de sia modesta povo kaj kapablo en la servo de suferantaj komunumoj. Ĝi havas Esp-an fakon, kaj invitas korespondadon de interesatoj. Service Civil International, 77 Boulevard Jean Jaures, Clichy, Seine, France.

La Okcidentaj Nacioj rifuzis la proponon de Sovetio ke tiu ĉi aliĝu al la Nordatlantika Defenda Konvencio. Ili nomas la proponon malreala. La Konvencio estas defendaparato kontraŭ Sovetio, kies aliĝo estus do nuligo de la organizo mem. Ĉu tio estus afero malbona?

—“Cite Nouvelle,” Parizo.

En letero al Dulles, Eisenhower, certiginte ke li ne volis vundi la sentojn de sia statsekretario, aldonis la jenan strangan kromdiron:—“Mi, kiel ankaŭ vi, estas nekapabla paroli kaj pensi en la sama tempo. Komprenu do, pro tiu aferstato, ke mi kontraŭvole ellasis vortojn, kiujn mi bedaŭras.” (samcite.)

“THE ATHENAEUM

biblioteko publika en Melburno konsentis akcepti ĉiumonate, de la Esperanta Klubo Melbournna (tiel en la teksto: Red.), ekzempleron de ‘The British Esperantist’”

Ne, karaj, ne kion vi pensas! La cito estas el “Pola E-isto” Jan. 1914.

DIS-

Krom la baza senco, tiu prefikso povas ricevi la sencon de MIS-, laŭ Plena Gramatiko, kiu ekzempligas per: disharmonio, diskredito, kaj —disvojo (?). Plena Vortaro vidas en DIS- “sencan kelkfoje tre proksiman al tiu de MAL- aŭ SEN-”.

Zam. en 1891 uzis “diskreditigi” (Originala Verkaro, 95) kaj Prof. C. Richet en 1914: “disharmoniaĵo”; “disarmita per la trankvileco . . .” (Fund. Krest. 160.)

DESAPONTI?

“Pri La Rondo (Aug--Sept. 1952). Desapont’, cetere uzita iufoje eĉ de Zamenhof, iom ŝerce, troviĝas ankaŭ sur p. 207 British E-ist, 2a linio (Sept.-Okt. 1952). Tion mi mem ĝojis vidi, ĉar mi ŝatus vidi tiun radikon (anglan kaj francan, kaj tre eble alilingvan) kutime uzata.”

—BERNARD LONG, Watford, Herts., Anglujo.

EN LA ANTAŬPAROLO AL LA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO

(Francisko Azorin): 1955.

“Ni respektos, kiel eble, etimologiajn ortografiojn, ĉar vorto estas valora arkeologiaĵo, kun tradiciaj kunmetoj, kiujn oni devas ne misformi: tiel Filozofio, samfamilia de Sofisto, Sofismo, Teosofio, Sankta-Sofio.” (“filozof” kompreneble estas la oficiala radiko.—Red.)

“Nia vortaro enhavas entute 60,000 vortojn” (titolpaĝe, nur 50,000.—Red.). “La zoologio enhavas milionon kaj duonon da registritaj nomoj; po 20 en paĝo oni bezonus 75,000 volumojn milpaĝajn!” (Aliloke Azorin skribis: “. . . preskaŭ du milionojn . . .”).

“VOJO DE LA VIVO”, organo de la Internacia Kristana Frataro, red., Livingstone Jenkins, 29 Cornwall Rd., Bexhill on Sea, Sussex. Skribu por senpaga literaturo.

Georges Duhamel, de la Akademio de Medicino kaj Franca Akademio, en letero al amiko: Salutas mi Esperanton kiel provon fidelan al la realigo de unuigo de la popoloj!” (Urugvaja “Boletin.”)

En letero al mi, Prof-o Waringhien konsilas uzi Olimpo (greka monto); Olimpio (greka urbo); Olimpiaj ludoj; olimpiado (kvarjara intertempo). Olimpiko (olimpiaj ludoj). P. 128, mi eraris—Nylen distingas, kiel Waringhien, inter Olimpo kaj Olimpio (monto kaj urbo).—Red.

J. A. B. Eliot (“Joab”) mortis la 18an de Septembro. Nekrologo sekvos.

La Rondo

The Australian Esperanto Monthly

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.

Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: K. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, S.E.8.

Vol. 12, N-ro 74.

MELBURNO.

Decembro, 1956.

PARLIAMENTARIAN AND PIONEER SPEAK FOR ESPERANTO

“Esperanto is Real Contribution to International Understanding.”

“The Victory of Esperanto is Inevitable.”

LESLIE HALE, M.P., expressed strong support for Esperanto in 1954:

“I believe that the provision of an international language is one of the really effective contributions which could be made to the cause of international understanding. I have attended many international conferences and experienced the very great difficulty caused by the necessity of interpreting each speech into several languages. Moreover, the most brilliant interpreter would frankly confess that you can translate the words, but you can never translate the spirit of the speech nor the personality of the speaker.

“Esperanto is the one international language which appears to have been accepted as a practical and effective tongue, and I should like to see Associations concerned with World Organisations and World Government announcing that after a certain date their conferences would take place in Esperanto.

“I should be very glad to have an opportunity of learning it myself. I suggest that the Esperanto Association might try to organise a class at the House of Commons.”

It seems a pity that such a flaming enthusiast—a man who can so feel about Esperanto without knowing anything of the joy and pleasure that every practising Esperantist experiences—could not bring himself to

buy a simple manual and master its contents. Let us hope that he has found the “opportunity” without undue trouble and is now a conscious advocate instead of one whose fervor is drawn from hearsay, however true this is.

Now let us turn to ERNEST ARCHDEACON (died 1950, aged 87). He was one of the most famous pioneers in aviation and a fervent Esperantist. In 1910 he published, with foreword by Henri Farman, a 266-page book to tell us “Why I Became an Esperantist.” In 1937 he wrote:—

“I sometimes become angry when I see that tremendous amounts of money are spent on war preparations or on expeditions to explore the North Pole or the South Pole, or to climb the Himalayas, enterprises whose practical usefulness is not at all certain and which are often inspired by rivalry among different nations. A small part of the money so spent, if it were devoted to the promotion of Esperanto, could assure its victory throughout the world. When will some rich philanthropist or some intelligent Head of State take action to give the Esperanto movement the ‘lift’ it needs? It would bring them immortal glory and would secure for mankind the greatest progress it has known since the tragedy of Babel. I cannot pre-

dict the date of the final victory of Esperanto, but I do predict that, sooner or later, its victory will be inevitable. All recent progress in practical fields is due to the principle of standardisation; improving the organisation of work in such a way as to obtain the greatest possible results with the smallest effort. Esperanto presents the most admirable application of that principle. It is impossible to prevent its final success."

REĜO VENCESLAS.

Staris Reĝo Venceslas
 Vintra en vespero;
 Cie neĝon vidis li,
 Altan sur la tero.
 Jen aperis malriĉul'
 Per lunlumo hela,
 Kolektante lignon en
 Frosto la kruela.

Reĝo: "Ho paĝi', jen kamparan'!
 Diru lian nomon:

Diru, kie povos ni
 Trovu lian domon?"

Paĝio: "Malproksime li, Sinjor',
 Loĝas sur la monto,
 Apud rando de l'arbar'
 Kaj la sankto fonto."

Reĝo: "Vino kaj viandon ni
 Portos en la domon:
 Ne hodiaŭ la malsat'
 Premos tiun homon."

Do la reĝo kaj paĝi'
 Iris en vespero
 Tra la brua, frosta vent',
 Akra la vetero.

Paĝio: "Nokto pli malluma nun,
 Pli sovaĝa estas:
 Timon sentas mia kor';
 Forto ne plu restas."

Reĝo: "Vidu, kie paŝas mi:
 En la signojn paŝu,
 Por ke vintra vent' al vi
 Furiozon kaŝu."

Post la reĝo la paĝi'
 Zorge do paŝadis:
 En la signoj de l'sanktul'
 Varmon li trovadis.
 Ho Kristanoj, se al vi
 Estas ia riĉo,
 Helpu al la senhavul'—
 Benos vin feliĉo.

Ni memoru, amikar',
 Pri la malriĉuloj
 En Kristnaska tempo, kaj
 Estu donemuloj.
 Ĉar la paco de l'homar'
 Estas nia revo,
 Amo al aliaj ja
 Estas nia devo.

Anonima; tradukis
 GABRIEL D. LEWIS.

NEKROLOGO. "Joab Eljot."

John Armstrong Blandford Eliot naskiĝis en Simlo, Hindujo, en 1878, filo de Sir John Eliot, F.R.S., K.C. I.E., M.A. Li edukiĝis ĉe Kolegio Malvern (Anglujo). E-iĝis en 1932. Eldonis la unuan numeron de La Suda Kruĉeto en Aŭgusto 1935. Gi aperis, sub diversaj nomoj, ĝis 1953. Sekvis ĝin sporadaj verketoj polemikaj aŭ poeziaj. La dekkelke da volumetoj abundas je brila humuro, saĝa observo kaj obstina kaprico. Eble la plej sukcesa estis Versaĵoj de Joe, 1947.

Li pace mortis pro pulmomalsano en Septembro 18.

Malgraŭ sia malmolnuka persisto en kio ŝajnas absurdo al la mondesagacaj, li estis animo honesta kaj sentema al la homa doloro ĉiaforma. Kerne kuŝis en li ne malmulte da funda vivovero. Al la Dio de l'ortodokso li ne volonte tributis, sed al la Spirito Eterna, ama kaj justa, mil linioj portas lian fervoran ateston. Li ŝire kaj brule vortvapis la hipokriton, malmoralon kaj tiranion de l'socio monda kaj nacia.

Anatole France rakontis pri "La Akrobato de Nia Sinjorino". Joab Eljot, en sia speco, ankaŭ estis "inspirata arlekeno", kiu vortjonglis kaj frazmiraklis, se ne konscie antaŭ Adorato Dia, tamen en spirito tre simila. Malgraŭ sia milda amindeco, li uzis sian talenton satire kaj ŝoke, rapire kaj moke, tiel agante plej purmotive. En arto tia, li certe troviĝus inter multe da religiaj fratoj, kiuj simile paskvilis.

Li estis unu fondinto de la renaska Aŭstralia E-Asocio en 1941, sed pro sia lingva reformemo li devis, dum iom da jaroj, soleci en la ombra malfavoro de puruloj, kiuj vidis lian etan gazeteton minaco al la uz-unueco. Kun A.E.A. li fine paktis en paco.

Preciza, intensa laborado fine forŝuĉis la vivforton de la solule verkanta, mempresanta apostolo, kies modeste portata voĉo atingis eĉ en korojn ĉirkaŭ la globo.

Ci-tere ne plu aktivis la ideriĉa cerbo, la lerte-movaj manoj. Hazarde lia Epitafo aperis en La Rondo (Apr. 1956) kiel li lasta plumdonaco.

Lia liro silentas. Amikoj lamentas forpason de unika figuro.

—F. R. BANHAM.

(Legu artikolon en L.R. Okt. '48, recenzojn Junio '47, Majo '54.)

“Mi ĉiam trovis Joabon Eljot homo inteligenta kaj pensema, eĉ kvankam mankis en li la disciplino, kiu venas el daŭra studado pri difinita temo. Kelkaj ideoj regis menson, kiu ne estis sufiĉe humila por kompreni la kontraŭefikon de aliaj—eĉ parencaj-ideoj. Por li argumenti estis: noti situacion kaj rezoni laŭ la emocioj vekitaj en li. Tio indikas en tia homo varman koron, sed konfuzan logikon. Tamen, estis ĉiam utile kaj interese studi liajn verkojn, ĉar tiel akra cerbo inspirita de nobla entuziasmo povis ilumini ĉiun diskuton.

Mi mem kaj admiris kaj respektis lin; talentojn multajn kaj riĉajn li havis. Li trovu en alia sfero sian sopiritan utopion.—C. C. Cowling.

PROF-O WARINGHIEN

skribis al homo, kiu sentis sin mal-supera pro sia manko de akademia eduko:—

Via letero tre ĝojigis min, kaj eĉ amuzis. Ĉar tie mi retrovis la saman opinion, kiun jam esprimis al mi Sturmer pri la rilatoj inter la “kleruloj, skolaroj” kaj la “mem-instruitoj” (self-made men). Tia demando estas tute fremda al mia spirito, kaj verŝajne al la spirito de multaj francoj. En miaj rilatoj kun homoj, mi ek-treme atentis ilian penskapablon, ilian intelektan povon — sed neniel zorgas pri la maniero, kiel ili ĝin malvolvis, ĉu per mem-ekzerco, ĉu per licea edukiteco.

Ŝajnas, ke por angloj tio tre gravas, ĉu ili trapasis la oficialajn ekzamenojn aŭ ne. Sturmer insistis pri tio en unu letero, ke li ne estas, kiel mi aŭ Kalocsay, iu “skolaro”. Sed neniumomente mi konsideris tiun bagatelon. Unu el miaj plej bonaj amikoj, kiun mi plej estimas, estas E. Lanti, kaj ankaŭ li estas mem-studinto.

Do, kiam mi parolas pri la “kler-eco” de Sturmer, de vi aŭ de alia, ŝajnas, ke sub tiu vorto mi (kaj eble ni francoj) ne metas la saman ideon, kian metus anglo. Per tiu vorto mi aludas tiun fakton, ke vi tre bone kaj rimarkinde posedas nian lingvon, multe legis kaj multe memoras, kaj tiun alian fakton, ke vi kapablas juste kaj klare juĝi la tiel akiritajn sciaĵojn. Por tio, oni neniel bezonas eliri el liceo aŭ universitato. (Oktobron, 1935.)

(Per tiu diro de sagaca homo, ni vidas unu el la plej belaj floroj de la pura franca spirito. Neniu sentema leganto povas legi lian leteron sen alta admiro al liaj honeste kaj delikate esprimitaj konvinkoj. Spiras el ĝi la parfumo de l'vera demokrateco kultura, la bazŝtono de ĉio havinda en demokrateco kun kiu ajn alia epiteteto.—Red.)

Australia Kroniko

● SYDNEY: La 6.10 ni havis profesian sorĉiston en la societa vespero, kiu multe amuzis la anojn. Samvespere oni lotumis fotelon, per kies profito ni emas plibonigi nian klubojon. S-ino Cooke jam kudris novajn kurtenojn por la fenestroj. La 3-an de Nov. parolis en nia societa vespero s-ro Walcott, pri la temo “Konstrumetodoj kaj evoluo de la kamparo en la Sovetunio, kompare kun Aŭstralio.”

La S.A.T.-rondo daŭre kunvenas ĉiumonate en la hejmo de s-ino Grace Barlow, kiu multe klopodas tiudirekten. Malfeliĉe ŝi malsaniĝis lastatempe. Ni esperas baldaŭ revidi ŝin inter ni kun malnova vigleco kaj entuziasmo.

F-ino Ursula Walde, bone konata al niaj s-anoj en Melbourne, Canberra kaj Sydney baldaŭ edziniĝos kaj ekloĝos en Sydney.—Volo.

● ADELAIDE: Grupkunvenoj estis lastatempe interrompitaj pro la vizito de f-no Addis al la Port Lincoln-regiono, kie ŝi vizitis la tieajn 2 ges-anojn, s-ino Mills kaj s-ro Syd Grant. F-ino Jean Kempson translokiĝis al fora norda urbeton Belalie North, kie ŝi nun instruas en kampara lernejo. Tio forprenis ankoraŭ unu pli el niaj jam malgrandaj vicoj.—H. W. Fidge.

● **CANBERRA:** La Canberra E-Klubo ĵus eldonis belajn poŝtkartojn, kiu trafas propagandas Esperanton. Prezo: 1½ por unu, 10/- por 100. Mendu ĉe s-ro N. Gamble, c/- Territories Dept., Canberra, A.C.T.

Nia fondinto kaj eks-prezidanto, s-ano Ralph Harry, kiu nun deĵoras kiel Aŭstralia Komisiito en Singapore, faris surprizan kaj mallongan viziton al Canberra. La Canberra E-Klubo proponas eldoni "Aŭstralian Antologion" kaj petas ke spertaj gesanoj kontaktu la sekretarion kaj helpu en la tradukado.

● **MELBOURNE:** Regule ĉiumerkrede kunvenas nia klubo kaj ni havis kelkajn tre interesajn prelegojn dum la lastaj semajnoj. Je 26.9 s-ro Burs-tin parolis pri "Edukado en diversaj landoj". Li mem estis instruisto en Pollando kaj Uzbekistano kaj ankaŭ ĉi tie li estas instruisto. Li tial kapablas kompari metodojn en diversaj landoj. Nia germana enmigrinto, s-ro Hermann el Stuttgart, provizis interesan vesperon je la 3.10. Kiam li rakontis kiamaniere li, kiel membro de la internacia turista asocio "La Naturamikoj", interkonatigis kun Esperanto. Por memori la ĵus mortintan karan Joab Eljot, s-ro H. Koppel, je 10.10, prezentis paroladon de nia mortinta s-ano, kiun li surbendigis en Sydney antaŭ kelkaj monatoj. Samvespere s-ro E. McKenzie prelegis pri la fama komponisto Schumann kaj ludis magnetofone kelkajn verkojn de ĉi tiu geniulo. Je 17.10. nia ĉiam juna Amy Godfrey parolis pri Alice Springs kaj vojaĝo kiun ŝi faris al la "Centro" antaŭ unu jaro. "Sep jaroj en Tibeto", la konata libro de aŭstriano H. Harter, estis revuita de s-ano H. Koppel dum du vesperoj (24 kaj 31.10). La multaj demandoj de la aŭskultantoj montris ke ĉi tiu "malpermesita" lando multe interesas la membrojn. La klaso de s-ino F. Koppel ankaŭ prezentis je 31.10 teatraĵeton, verkitan de Amy Godfrey, kiu temis pri hazarda renkontiĝo de angla, franca, amerika kaj 2 rusaj gevizitantoj okaze de la melburnaj Olimpiaj Ludoj. La aktoroj estis s-ro Tighe, D-ro Williams, ges-roj Milligan kaj s-ino Koppel.

Kiel unuajn vizitantojn al la Olimpiaj Ludoj, ni bonvenigis 7.11. ges-

rojn Nolan el Wanganui (Nov-Zelando) s-ro Nolan prezentis per sia magnetofono paroladojn de d-ro Lappena (UEA-sekretario), de s-ro Leslie (BEA-sekretario) kaj s-ro Holmes (Prez. de la Londona E-Klubo). Li finis la tre interesan vesperon per kantado de Maori-kantoj kune kun sia edzino.

En la septembra kunveno de la RENDEUVUO s-ro Verner Rolding montris belajn lumbildojn kaj prelegis pri sia vojaĝo de Svedujo al Aŭstralio. D-ro Williams estis la parolanto en Oktobro. Li rakontis pri la vivo kaj verko de George Fox, fondinto de la Societo de Amikoj (Kvakeroj).—H.K.

Ni bedaŭrinde NE ricevis raportojn el Brisbane aŭ Perth.

DE LA SEKRETARIO.

Okaze de la jarfino mi deziras sendi miajn tutkorajn salutojn kaj bondezirojn al ĉiuj membroj de A.E.A. tra nia vasta kontinento. Mi esperas ke ĉiuj membroj kaj kluboj pli aktive subtenos nian tutlandan asocion dum la venonta jaro.

Dum ĉi tiu jaro, nia ŝatata s-ano E. Hearne rezignis la postenon de Ĉef-Peranto de la Libra Servo, pro profesiaj kaŭzoj. Nur tiuj, kiuj vere scias kiom peza estas la posteno, povus bone taksii la bonan laboron de s-ano Hearne. Li estas multokupata homo, sed tamen li restis fidele ĉe sia posteno ĝis ni trovis novan bonulon. Li meritas la tutkoran dankon de la tuta samideanaro. Mi esperas ke li restu ankaŭ estonte fidela de A.E.A.

Ĉiu landa libro-peranto estas petata doni la saman bonan kunlaboron al nia nova ĉef-peranto, s-ro N. G. Mills. S-ro Mills estas longjara E-isto, kaj mi estas certa ke li faros bonan laboron por nia movado. (Lia adreso: Cnr. Durack St. and Ipswich Rd., Moorooka, Brisbane, Q'ld.)

Plaĉas al mi raportii ke ni fine trovis spertan novan administrantinon por la "Rondo". F-ino V. Cox akceptis ĉi tiun postenon kaj estonte ekspedos nian gazeton. De tempo al tempo gazetoj perdiĝas en la poŝto kaj mi petas ĉiun s-anon kiu ne ricevis lastatempe iun ekzempleron de la "Rondo" tuĵ kontakti aŭ min au f-inon V. Cox (31 Albany Cres., Surrey Hills, E.10, Vic.).

Per skriba balotado la estraro elektis s-ron N. Gamble (Canberra) kiel estron por Propagandaj Aferoj. Ĉi tiu posteno estas tre grava, sed s-ano Gamble nur povos taŭge plenumi ĝin, se ĉiu loka klubo TUJ elektu lokan kunlaboranton por propagandaj aferoj kaj kontakti kun s-ano Gamble, c/- Territories Dept., Canberra.

Per la sama balotado la estraro decidis aranĝi la venontan—11-an—Aŭstralian Esperanto-Kongreson dum Januaro 1958 en Melburno (Detaloj sekvos).

Pli regula eldonado de la "Rondo" estas nia forta volo por la venonta jaro, sed multe pli regulaj klubraportoj flanke de la lokaj sekretarioj ankoraŭ mankas. Ĉu, do estas tro granda peto, ke ĉiu klubo elektu raportanton por la Rondo kaj sendu ĉiumonate mallongan leteron al Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne? Ne gravas kiom vi raportos, sed raportu!

Kun plej koraj bondeziroj por la kristnaska kaj jarfina periodo,

Via Sekretario,
HERBERT KOPPEL.

PROFESORO N. B. JOPSON.

F-no Violet Nixon petis nin aperi la jenan. Ĝi estas sek-io de la Society of British E. Teachers.

Julio-Okt. 1955, Prof-o Jopson, prof-o pri Kompara Filologio ĉe la Uni. de Cambridge, prelegvojaĝis en Aŭstralio kaj Nov-Zelando kunlabore kun la British Council kaj la Komitato de Aŭstraliaj Universitat-estroj. Ĝus emerita, li estas unu Honora Konsilanto de la Soc. de Britaj E-Instruistoj, kaj kun lia permeso la sek-ino de S.B.E.T. tradukis parton de lia raporto por preso. Li faris dumvojaĝe iom da propagando por E-o kaj trovis konsiderindan intereson pri ĝi.

10 Julio 1955: Belega, sennuba—kaj varma—tago bonvenigis min al Aŭstralio vintro. Gastamaj profesoroj el la Uni. de Okc. Aŭstralio kondukis min al siaj hejmoj, al lunĉo, kaj poste al la bela Universitato. Rondvojaĝo de la urbo sekvis kaj oni eskortis min al futbalkonkurso (laŭ Aŭstralia regularo); tie mi aŭdis s-inon admire ekkrii, ke ŝia filo akiris du postajojn (A. behinds; subgravaĵa poentojn). En mia bonega hotelo la stabo estis grandparte enmigrintoj Eŭropaj. Ĉiuj Aŭstralianoj entuzias-

me atentis la agadplanon por enradiki Eŭropanojn, kaj ĉie mi ekkonis multajn tiajn novalvenintojn, kelkfoje lacegige multajn, se okaze la famo diskonigis, ke mi scias la gepatran lingvon.

La aŭskultantoj tutkore kaj ofte tre boninformite streĉatentis mian prelegprogramon. Gastamo malavarega malhelpis al mi meditado kaj korespondon, kvankam sek-ioj ĉieluktis por ĝisdatigi mian sciantecon. Tia bonkoreco tre plezure min impresis, kaj mi estas sincere dankaj!

Miaj impresoj pri la universitataj urboj en Aŭstralio kaj N.Z. tute superis mian supozon. Mi konstatis, ke kvankam novaj laŭ tempo, ili posedas individuecon tute propran. Plezure frapis min la bela park-kaj stratplanado, la bone provizitaj butikoj kaj distrejoj, kaj la vesta eleganco de la loĝantoj. Komparoj estas evitindaj, kiel fremdulo baldaŭ eklernas se li laŭdas Melburnon pli ol Sidnejon, aŭ la Nordan Insulon pli ol la Sudan (bv. noti, ke mia envicigo estas laŭalfabeta). Mi tial simple sincere diras nur, ke ĉiuj montris al mi ravajn vidaĵojn—majesta Adelaide, marĉirkaŭita Hobart, civitama Melbourne, dolĉe ombra Brisbane, belkampara Armidale, vigla Sydney, etendiĝanta Canberra, gracia Auckland, alloga (prefere ol venta) Wellington, Angleca Christchurch kaj Skoteca Dunedin.

Ne ĉie oni faris hotelaranĝojn por loĝigi min. Ĉe Adelaide, Melbourne, Brisbane kaj Canberra mi plejparte ĝuis la agrablajn de la kolegioj, kies vivkondiĉoj tre similas niajn. Stabo kaj studentoj libere intermiksiĝas—ĉiu estas gastama kaj fervorega.

Post vespermanĝoj mi alparolis grupojn da gejunuloj, komparante nian kaj ilian vivmanieron. Postrestas agrablaj rememorigiloj de miaj vizitoj al Adelaide kaj Melbourne—la kravatoj de St. Mark's kaj Trinity. Mi ofte portas ilin.

En Anglujo, tiel same kiel en la Antipodoj, oni ofte petis min kompari la universitatan nivelon pri lingvos-tudo kaj atingoj en la du terpartoj. Tio estas preter mia kapablo; mi do ne provos respondi. Tamen mi volas substreki mian entuziasmon por la alta grado de praktika modernlingva

laboro en Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Mi miris trovi, ke la stabanoj de la Franclingva fako en ĉiuj universitatoj regule parolas France inter si, kaj, laŭ mia juĝpovo, je la plej alta nivelo. En lando, kie la procento de Francoj estas nekoniderinda, tio ŝajnas al mi elstara.

PARTY GAME.

Make a sentence containing at least one of each Esperanto letter in the alphabet. Here's a game with just the right modicum of searing frustration to appeal to organisers of similar "party" horrors. One A. D. Clark, an Esperantist genius, came up with ten such, says "Heroldo de Esp-o," 16/9. We like this one:—

Esperanto, la internacia lingvo, estas la bonega inventaĵo de la ĝentila kaj ŝatata Doktoro Zamenhof, kaj ĉiuj aliaj lingvaj projektoj estas nur fantaziaĵoj aŭ himeroj.

KABE KUN NI!

Raporte en Heroldo de E., s-ro Dratwer informas, ke la plej bona stilisto Kabe (Kazimir Bein), nun 84-jara, refariĝis E-isto. Antaŭ multe da jaroj li forlasis la movadon.

Li loĝas en Lodzo, kaj partoprenas E-kunvenojn tiurbe. Pri la aperonta nova eldono (la tria) de "La Faraono" li vigle interesigas.

Lia reaniĝo morale tre impresas, sed ni dolore devas supozi, ke lia profunda aĝo kaj longa neuziteco de E-o ne brile promesas novajn verkojn de lia talenta plumo.

. . . . Al vi la Esperanta vorto

Nun eble sonas jam arabe. . . .

Ĉu tio estas poezia hiperbolo, aŭ fakte vera parolo, ni ankoraŭ ne scias. Tamen ni tutanime esperas, ke jam la sonoj de nia mirinda lingvo denove vibrigas la kordojn de lia brava koro.

(La red. havas kopiojn de letero de George Gordon al Kabe teme la tiame ĵus eldonitan "La Faraono", 1908, kaj la respondo de Kabe.)

NORVEGOJ—VIA ŜLOSILO!

En 20,000 ekz. 1/- aŭ 2 r.k. de Esperanto A/S., Boks 942, Oslo. Bonega revizio, 32 p. R. Bugge-Paulsen, L.A., plene ĝisdatigis la verketon, kies antaŭa eldono estis en 1934.

KION FARAS U.E.A.?

Dum la lasta jardeko la Universala Esperanto-Asocio aplikis kvar rimedojn por efektiviĝi sian ĉefan celon—la disvastigo de Esperanto.

Unue, la riĉigo de la lingvo per plia kultura enhavo; due, sciencse bazita dokumentado; trie, kvanta intensigo kaj kvalita plibonigo de la informado; kaj kvare, firme planitaj klopodoj pri laŭstupa agnosko de la lingvo fare de internaciaj kaj naciaj instancoj.

En la unua kategorio estas: Internacia Somera Universitato, la Belartaj Konkursoj, la organizo de internaciaj prelegvojaĝoj kaj la subteno de diversaj internaciaj kursoj kun kultura karaktero.

La duan kaj trian bone prizorgas la nun firme bazita Centro de Esploro kaj Dokumentado, kies agoj ĉe Unesko estis tiel rimarkindaj, sed tio jam rilatas al la kvara punkto; kaj en tiu rilato menciindaj estas la klopodoj ĉe la Eŭropa Konsilantaro pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

La minimumo, kiun vera verdulo devus fari, estas ne nur subteni nian neŭtralan internacian organizon per daŭra membreco, sed, laŭ ebleco, alitiĝi tiun membro-kategorion kaj varbi al la Asocio individuajn membrojn inter la E-istoj, kaj apogantojn inter la ne-Eistoj. Do, pagu vian kotizon al U.E.A. kiel eble plej frue:—Membro-abonanto 26/-; membro-subtenanto 38/- (tiu nur plu subtenas sen pluj privilegioj); membro kun jarlibro 13/- (tiu ne ricevas la bonegan gazeton).

Abono al Heroldo de Esp-o 26/-; Nica Literatura Revuo 12/6; British E-ist 16/3.

—KEN LINTON (Ĉefdel. por U.E.A.).

DR. FRED WILLIAMS

will be the guest of Mr. and Mrs. M. Leereveld in HOBART during the last week in December. The latter are arranging various gatherings of E-ists, old and new, and of others interested, between Boxing Day and New Year's Day.

Any who would like to take part, Tasmanians or others, are asked to inform Mr. Leereveld at 41 New Town Road, Hobart, as soon as possible.

Recenzoj

CIRKAŬ LA NASKIGO DE MIA MISIO" de Martinus, el la Dana tradukis C. Graversen. 57 p. 6.50 Danaj kronoj (?). Eld. Spiritu Instituto de Martinus, Mariensdalveg 94-96, Copenhagen F.

Martinus pledas kontraŭ la kredo, ke Di-revelacioj okazis nur en la Biblia antikveco kaj sin asertas ricevinto de aparte gravsignifaj prilumadoj al sia spirito kaj sciantece. Li sin rigardas en diferenca kategorio ol tiaj modernaj mistikuloj, kiuj pretendas similajn spertojn. Li montras sur la realiĝon de siaj revelacioj sub formo de "absolute nekontestebla spirita scienco kaj konceptmaniero, fakte nova kulturo, por ĉiu homo je sufiĉe evoluinta moralo kaj prudento."

Legante la ĉapitrojn 16, 17, 18, homoj reagos laŭ sia propra racio aŭ sentimpreso. Ni nur diru, ke la lingvaĵo per kiu Martinus priskribas siajn Jehezkel-ecajn viziojn rajtigas nomi lin homo de aparte dotita literatura esprimovo. Estas malfacile, pensi, ke tiajn vortbildojn pentrus nesincerulo. M. asertas, ke dum la spertoj li ne estis en tranco, sed konscia; li plene kontrolis la fenomenojn, enkondukante kaj ĉesigante ilin laŭ sia deziro.

Estus farinde, kompari similajn travivaĵojn, kiujn priskribis D-ro Rayner Johnson (Melburna Univ.) en sia rimarkindega libro—"The Imprisoned Splendour" (1953). La stranga rakonto de M., ankaŭ pro sia proza perfekteco, bone okupus lokon en tiu mirinda kompilaĵo pri la supermateria, la t.n. parafizika.

Studentoj pri mistikismo aparte substrekanta la viziojn, devus kompari la doktrinojn de M. kun tiuj de Svedenborg, kun kiu ili havas similecon.

Pri la citita teksto el Mateo 10/29, "Pasero ne falos teren sen via Patro," ni diru, ke kelkaj Grekaj manuskriptoj enhavas "la volo de" post "sen". Tio estas pli klarsenca.

"POLLANDO," grandioza gazeto en E-o. Mazowiecka 11, Warsaw.

Kutime tiu bela gaz. aperas seslingve: pola, angla, franca, germana, hispana, rusa. Propagandu kaj rekomendu ĝin. Se la eksperimento

sukcesos, verŝajne aliaj n-roj aperos en E-o. Petu ĝin je supra adreso.

SENNACIECA REVUO, N-ro 84. La ĉefa artikolo, de A. Caubel, traktas detale-pacience sed iom tro akademiece la problemon de lingva hegemonio kaj la universalismon de la franca lingvo en la 18a jarco.

La Plena Gramatiko, p. 297 (1938) menciis prepozician uzon de la radiko FAR, analoge al PER apud PERE DE. Tio liverus tre oportunan formon por la subjekta suplemento: la dediĉo de la preĝejo al San Mihelo far de nia pastro. J. Regulo Perz ekzamenas tripaĝe tiun ne tre revolucian proponon, komparante similan uzadon en aliaj lingvoj.

Pri Skribo de Muziko estas valora tezo, verkita de homo bone scianta sian metion. Ni timas, tamen, ke la zorge kompilita teksto havos intereson nur por fakuloj.

Boulton, Baghy, Schwartz, Alings, La Colla estas inter la kontribuintoj. Prezo 5/- Aŭst.

RECENZOTAJ.

Voltaire:— KANDID; ZADIG; SENARTIFIKULO, en la trad. de E. Lanti. Eld. S.A.T. Tri verkoj de la Franca satirmajstro.

"LA SENPERA VERBIGO DE ADJEKTIVOJ," trafa lingvostudo de H.A. de Hoog.

"LA REVOLUCIO DE ĈINIO" de Hanna Kobylinski, trad. el la Dana de G. Graversen. Eld. S.A.T. Konciza kaj informdona skizo de la vojo sekvita de la nuna Ĉinio.

"EZOPA SAĜO"—77 fabloj de Ezopo brilklare tradukitaj de nia plej fama poeto, Kalocsay. Eld. Koko, Kopenhago.

PRONONCO?

Ĉar multaj el ni embarase grimacas, kiam ni parolas pri niaj korifeoj, mi pensas bona, atentigi pri la prononcindikoj donitaj en la Encik. de E-o (de kiu, cetere, ni bezonas novan eldonon!). Kelke da ekzemploj:—

Archdeacon (arŝdik'n); Baghy (bagi, ne badi, kiel iuj supozas); Fruitier (fruitje); Grosjean - Maupin (grojan mopen); Kalocsay (kaloĉai); Szilagy (siladji); Waringhien (varengjen).

VIDO EN ESTONTECON!

Ernest Archdeacon, E-isto fama en sia tempo, skribis en 1913:—

“Niaj infanoj flugados kun tia rapideco, kian ni nun ne povas imagi. Ni penos atingi aliajn planedojn, se ne vizitos nin pli frue la loĝantoj de tiuj mondoj. Oni inventos raketojn, kiuj konstante mem akcelas sian movon. La problemoj estas, kiel atingi rapidecon de 11 kil. je sekundo, kio sufiĉos por foriĝi el la sfero de tera altirado. Vojaĝo cirkaŭ la tero daŭros 66 minutojn. . . . Mi supozas, ke la materialo uzota estos radiumo. Jam nun, per eksplodo de 27 kg. da radiumo, ŝargajo peza 1 tunon povas trakuri la spacon inter la tero kaj la luno dum 49 horoj. Dum tiu tempo senĉesaj eksplodoj de radiumo akcelos la movon de la ŝargajo. Sole malfacile estos transformi la energion de radiumo dum 49 horoj, ĉar laŭ nunaj kalkuloj tio postulas 2800 jarojn.

“Posedante 400 kg. da radiumo oni povos viziti planedon Venus kaj reveni sur la teron.” El kie oni ĉerpos tiel grandan kvanton da radiumo, pri tio Archdeacon silentas. Sed eble en la interno de la tero kuŝas grandaj minoj de radiumo. Finas la aŭtoro: “La loĝantoj de diversaj planedoj interkonatiĝos reciproke.”

—“Pola E-isto,” Jan. 1914.

Skribado de la supersignaj literoj ne kostas multe da tempo. En du artikoloj, kun ĉirkaŭ 4800 literoj, estis 102 supersignoj, do el ĉiuj 100 literoj iom pli ol 2 havas supersignon. Se mi povas maŝinskribi normalan E-an tekston en 60 minutoj, mi povus skribi ĝin laŭ la ortografio (sensupersigna) de s-ro Kubacki en 58 minutoj. (Kalocsay, Lit. Mondo, Majo 1948. Kubacki tiutempe provis sensupersignigi la E-an alfabeton.)

SOSI(ET)A VESPERO?

Ni respektive atentigas niajn reportantojn pri rimarko de Ivo Lapenna en “Esperanto”, Majo 1954:—

“Socia vespero estas en Esperanto vespero koncernanta la homan socion! Tute alia afero estas societa aranĝo, aŭ amuzo, aŭ eĉ societa vespero.”

Ni kuraĝas pensi ke nur tre mal-

ofte la samideanoj kunvenas por diskuti la aferojn de la homaro entute. Konsiderindaj estas la sekvantaj esprimoj:—

Vespero amikiĝa, -iga, interkona, interkonatiga (por la logikemuloj) signifas: “get-together”, reciproke konatiga.

Interamika (meeting of more-or-less old friends; revido de plimalpli intimaj amikoj). Babila (talk-fest, gab-fest, laŭ la verklingvo de Sinclair Lewis. Conversazione, conversation evening, “social”, laŭ pli bona idiomato).

BOULOGNE-SUR-MER.

En la Oktobra n-ro de “Esperanto” vi trovas belan foton de la Kongresantoj tie en 1905. El ili ankoraŭ vivas almenaŭ 14, verŝajne ankoraŭ aliaj.

WORLD CLIPPINGS.

The “Manuel d'Initiation a l'Esperanto”, published and sold through the customary book channels by the famous EDITIONS NOVA, met with extraordinary success. A new edition is in progress. (Rondo, p. 120.) It is the first of a series of such works.

The Chinese Esperanto League has been re-established: P.O. Kesto 77, Peking.

The “Socialist Leader”, Glasgow, reprinted an article by Gorki, “Cu Esperanto Estas Utopia?” (4/8) and another (25/8) on the favorably revised pages on Esperanto in the “Great Soviet Encyclopedia.”

A. W. R. VROLAND

in the “Educational Magazine” (Ed. Dept. of Vic.), September, p. 381:

“I believe that the time will come when most Australian children will read in at least two foreign languages—one Romance and one Teutonic, and we might well add Esperanto.”